

HORIZONTO

IV-a JARO N-o 20 (2)

MARTO - APRILO 1979

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



ATENO: PORTALO EL KARIATIDOJ

EIOJ PRI LA STATUTPROJEKTO DE UEA

LA SANKTEJO

MIRINDA VERKO DE ADMIRINDA HOMO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón
Redakta Komitato
Salvador Gumá
Juan Régulo
Jean Thierry
Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografia C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Lega Depono Z-133-76

N.º 2 - Marto - Aprilo 1979

ENHAVO

EHOJ PRI LA STATUTPROJEKTO DE
UEA (Ivo Lapenna)
UEA DEVAS ESTI LIBERA DE DIREKTI-
VOJ... (A. Albault)
GRANDECOJ KAJ ETECOJ DE ESPE-
RANTO (Marcel Duplan)
HISPANA ESPERANTO-MUZEO - MIRIN-
DA VERKO DE ADMIRINDA HOMO
(Ivo Lapenna)
LA NEDERLANDA, HOLANDA KAJ LA
AFRIKANSKA (Edwin de Kock)
MALREKTE, MALSAGE KAJ... (Salvador
Gumá)
ESPERANTO, KANDIDATO POR LA
ROLO DE KOMUNA EUROPA LINGVO
(Rikardo Sulco)
PLIAJ HONTINDAJ KALUMNIOJ DE
HEROLDO (Ivo Lapenna)
BELETRO
Horacio 1, 4 (trad. Friedrich Coburger)
Printempa bildo (Zora Heide)
La femme fatale (Zora Heide)
LA SANKTEJO (Bernard Golden)
PRI KAJ CIRKAŬ SUFIKSA, PRECIPE
LANDNOMA - IO (Edwin de Kock)
PRI LA STRATNOMOJ DE BIALISTOKO
(J. Giladi)
ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)
Redaktas (Ivo Lapenna)
TRA LA ESPERANTO-GAZETARO Redak-
tas (Jean Thierry)
LIBROJ SUB LA LUPEO Recenzas (Jean
Thierry)

KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Ad-
ministracio: Inés Gastón, Paseo Marina
Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĝk.
Zaragoza 00428398 (Jarabono 500 ptoj.), aŭ
la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
GRAZ. Pĝk. Graz 1257.845. Jarabono:
160,— S.

Britujo:
Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON
N13 4UL. Pĝk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:
Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610
RØDOVRE, Pĝk. 6287859. Jarabono: 60,—
D Kr.

Finlando:
Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101
KUOPIO 10, Pĝk KU 152801-5. Jarabono:
38,— F. Mk.

Francujo:
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle,
F-75018 PARIS. Pĝk. Paris 21.670.96 V.
Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:
Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5,
D-3000 HANNOVER 1. Pĝk. Hannover 120
854-301. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:
Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omo-
nia, ATHENO 101. Jarabono: 380,— Grekaj
Drakmoj.

Israelo:
Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH
TIKVA. Pĝk. Bank Hadassah 4-45854-8.
Jarabono: 84 izr. liroj.

Jugoslavio:
D-ro Oton Pancer, Vocaško Naselje 10,
YU-41000 ZAGREB. Jarabono: 180 n. din.

Kanado:
Kriss Smilga, 34 Martin Road, TORONTO
Ont. M4S 2V2. Jarabono: 10,— \$.

Luksemburgo:
Wickler Albert, OLM. Pĝk. 54175-49. Jara-
bono: 380 lfr.

Rumanujo:
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502
R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el
tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando
estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel
perantoj, bv. sin turni al la direktorino

PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANFS, S. A.
ESPLUGAS DE LLOBREGAT
(Barcelona - Hispanujo)

EĤOJ PRI LA STATUTPROJEKTO DE UEA

~~En~~ analizo de la plej gravaj ŝanĝoj entenataj en la nova statutprojekto de UEA (*Horizonto*, n-ro 1/79), kiel ankaŭ en aparta cirkulero sendita al ĉiuj sendependaj landaj asocioj (LA), t.e. asocioj ne dependaj de ekstermovadaj politikaj faktoroj, kaj al nombro da elstaraj aktivuloj, renkontis pozitivan reagon. Inter la multaj aliaj, gratulojn kaj dankon esprimis H. W. Holmes, Honora Prezidanto de UEA ĝis julio 1974, kaj s-ino N. Holmes, ambaŭ dumvivaj membroj de UEA. John Brownlee, la Honora Sekretario de Brita Esperanto-Asocio, skribis: «Kelkaj el ni samopinias kun vi kaj certe agos». Daniel Luez, la fondinto de Koresponda Servo Mondskala, DM, D kaj FD de UEA, kore dankis kaj aldonis kopion de tre trafa letero al UEA. Same celtrafe agis *cand. oecon.* H. W. Rasmussen, unu el la plej elstaraj esperantistoj en Danlando. Marjorie Boulton informis, ke ŝi «skribis serioze al la prezidanto de UEA pri la Statuto, insistante pri la principo de neŭtraleco». R. Bernard, la sekretario de la Akademio kaj multjara funkciulo de UFE kaj UEA, dankis pro la atentigo «pri la danĝeroj de la nova statutprojekto» kaj aldonis: «Mi ĵus skribis al la prezidanto de UEA kaj intencas pri tio same atentigi miajn kolegojn en la Konsilantaro de UFE». La redakcio de Radio Vatikana aparte dankis «pro la informo cirkulero pri neŭtraleco de UEA». Simile de multaj aliaj flankoj.

En ĉiuj-ĉi kazoj temas ne pri novuloj aŭ pri iuj meteoroj, kiuj subite aperas sur la Esperanto-firmamento kaj malaperas senpostsigne, ofte post kiam ili faris sian negativan laboron, sed pri mondkonataj aktivuloj, harditaj per multjara laboro en la Esperanto-Movado kaj tial konsciaj pri la graveco de la principo de partipolitika neŭtraleco por la estanteco kaj, eĉ pli, por la estonteco de la Esperanto-Movado.

Siavice, jam antaŭ ol ricevi la menciitajn analizojn, D-ro A. Albault per inspira cirkulero proprainiciate alvokis la francan esperantistaron pledi por la konservo kaj respekto de art. 4, 13, 16 kaj 21 de la nuna Statuto. Lia intelekto altnivela kaj kortuŝe emocia alvoko aperas en tiu ĉi numero de *Horizonto*.

Montriĝis, tamen, ke en pluraj medioj oni ankoraŭ ne bone komprenas la esencon de la nuna profunda krizo kaj la grandajn danĝerojn, kiujn prezentas la statutprojekto. La hamburgaj eventoj jam perdigis al UEA preskaŭ unu kvinonon de la kerna, individua membraro; la eventuala akcepto de la statutprojekto senigos la Asocion ankaŭ formale de ĝia neŭtraleco kaj tial tutcerte perdigos al ĝi pliajn centojn da individuaj membroj kaj komplete kompromitos ne nur la Asocion, sed eĉ la lingvon mem en la netotaleca mondo.

Kelkaj demandis kion, do, fari por ne perdi tiujn organizaĵojn aŭ instancojn, kiuj pro la karaktero de la politika reĝimo en siaj landoj tutsimple ne havas la eblecon esti partipolitike neŭtralaj. La respondo estas sufiĉe simpla: aŭ firme teni iliajn partipolitikajn agadojn en la maksimume permesiblaj limoj de la laŭstatuta neŭtraleco, kiel tio okazis ĝis Hamburgo (kaj plu okazas en tuta aro da internaciaj kulturaj, fakaj kaj sportaj organizaĵoj kun prudentaj gvidantaroj), aŭ malakcepti ilian *membrecon en UEA* kaj samtempe establi kun ili kunlaborajn kontraktajn rilatojn laŭ art. 16 de la Statuto, *en ambaŭ kazoj sen kompromiti la partipolitikan neŭtralecon de UEA*. Art. 16, stipulanta la rajton de UEA fari kontraktojn pri kunlaboro kun neneŭtralaj Esperanto-organizaĵoj, estis samtempe enmetita en la Statuton ankaŭ por ebligi ĝuste tian taŭgan kompromisan solvon, se la intereso de Esperanto en konkretaj politikaj cirkonstancoj en la mondo tion postulas. Kial ne apliki ĝin nun, se efektive ekzistas ia plimulto en la nuna gvidantaro de UEA sincere deziranta reestabli la partipolitikan neŭtralecon de la Asocio, kiel kelkaj asertas? Kompreneble, la emfazo estas je «se».

Tre multaj ankoraŭ ne konscias ĝis kiu alta grado UEA jam perdis sian sendependecon eĉ sen konsideri al aliaj aspektoj de la krizo. *Tute ne temas pri la nekontestebla rajto de ĉiu membro de UEA havi siajn proprajn filozofiajn konceptojn, konfesadi sian religion aŭ esti membro de kiu ajn politika partio, inkluzive, kompreneble, iun el la komunistaj de diversaj tipoj.* Tiaj apartenoj per si mem neniam kaŭzis ian problemon, nek kiu ajn venis kiam ajn al la ideo ekzamenadi ilin, aŭ neadi la rajton je membreco en la Asocio pro ili. *En la nuna krizo de UEA temas pri io tute alia, nome pri la perdo de membreco pro la decida influo de fremdaj, ekstermovadaj politikaj fortoj je la sorto de la Asocio.* Tio manifestiĝos ankoraŭfoje okaze de la voĉdono pri la statutprojekto, se la sendependaj landaj asocioj kaj iliaj komitatanoj A, helpataj de konsciencaj aliaj komitatanoj, ne malhelpos en Lucerno ĝian voĉdonigon en la nuna formo.

Jen kiel prezentigaĵas tiurilate la situacio:

Laŭ art. 43 de la Statuto, por ŝanĝi la Statuton necesas du trionoj de la esprimitaj voĉoj, kondiĉe ke tiuj voĉoj reprezentu minimume duonon de la tuta membraro. Estas certe, ke ĉiuj gvidantaroj de la «landaj asocioj» en kvin el la landoj de la Varsovia Pakto, sen kia ajn konsultiĝo kun la membraro, kaj la individuaj membroj en Soveta

Unio, nepre «fidindaj», voĉdonos por la forigo el la Statuto de la esencaj klaŭzoj pri neŭtraleco, t.e. por la akcepto de la koncernaj ŝanĝoj en la statutprojekto. La fakto, ke ĉiu iom objekte informita pri la vera situacio en UEA povas tion prognozi sen riski eraron, per si mem estas plia pruvo pri la regado de fremdaj elementoj en la nuna UEA.

Laŭ la lasta publikigita statistiko, UEA havis 31.776 membrojn en 1977, el kio 14.046, do iom malpli ol duonon, en la menciitaj ses landoj, se estas ĝustaj la informoj, kiujn ili mem donis. Verŝajne tiu stato restis proksimume sama en 1978 kaj restos tia en 1979. Tio signifas, ke — simile al la situacio en la Komitato en 1974 — tute sufiĉas, ke nur du el la pli grandaj sendependaj landaj asocioj, ekzemple la franca kaj brita, aŭ la brita kaj germana en FRG, voĉdone aliĝu al la bloko por doni al ĝi absolutan plimulton de la tuta membraro, eĉ se ĉiuj aliaj landaj asocioj voĉdonos, kio apenaŭ estas kredebla por la eksterbloka mondo, kaj, krome, voĉdonos kontraŭ. Voĉdona aliĝo de nur 2-3 pliaj donus al la bloko la necesajn du trionojn de ĉiuj esprimataj voĉoj.

El tio sekvas, ke por malebligi la akcepton de tiuj vere katastrofaj ŝanĝoj necesas plej firma kaj maksimume unueca rezisto de ĉiuj sendependaj LA kaj de ĉiuj esperantistoj, por kiuj la sorto de UEA ne estas indiferenta. *Absolute ĉiuj sendependaj aliĝintaj asocioj kaj absolute ĉiuj individuaj membroj en landoj sen aliĝintaj asocioj devus partpreni en la voĉdono kaj unuece voĉdoni kontraŭ la tutan statutprojekton en la nuna formo, aŭ almenaŭ kontraŭ art. 5, 13, 15 kaj 21 de la projekto.* Nur tiamaniere la kontraŭneŭtralecaj artikoloj de la projekto povos esti rifuzitaj, kio plu konservos almenaŭ la formalan statutan eblecon revenigi la Asocion al la antaŭa praktiko de laŭstatuta neŭtraleco, sive antaŭkondiĉo por la solvo de la profunda krizo, en kiu ĝi nun troviĝas.

Ivo Lapenna

Membro-Abonanto de UEA/IEL/UEA
1929 - 1975

UEA DEVAS ESTI LIBERA DE DIREKTIVOJ...

(Noto: D-ro A. Albault, membro de la Akademio de Esperanto, antaŭe prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE), sendis la suban alvokon al Honor-Prezidanto de UFE, al prezidanto de UFE kaj al la membroj de la Estraro kaj Konsilio de UFE, al la prezidantoj de Federacioj de UFE kaj al ĉiuj UEA-delegitoj en Francio. Kun la permeso de D-ro Albault, Horizonte publikigas la alvokon komplete, ĉar ĝi fakte rilatas ankaŭ al ĉiuj aliaj landaj asocioj kaj delegitoj de UEA. — La Redakcio.)

Tre estimataj

En la lumo de l'monda Jaro pri Komunikigo kaj en la konjunkturo de l'Eŭropaj elektoj en proksima junio, kun ties noveco kaj la fakta bezono de komuna lingvo, ni povus ekhavi grandajn esperojn por la venonteco de nia movado.

Sed ĉu ni estas fideblaj per la rekteco de nia spirito kaj la neteco de niaj motivoj? Ĉu ni estas Esperantistoj en la spirito de Zamenhof, kiu volis alporti fratecon al ĉiuj homoj «ne enrudigante en la internan vivon de ĉiu nacio»? Aŭ ĉu ni vole-nevole surportas alian koloron ol la verdan?

Ĉiuj el vi iam provis kontakti parlamentanojn aŭ aliajn politikulojn kaj prave denove faros, kiam necesos. Sekve vi ĉiuj bone scias, ke se Grupo, Religio aŭ Partio X subtenas nin, ni tuj estas konsiderataj de aliaj kiel X-subtenantoj. Sed same bone vi ĉiuj scias, ke X-subtenado estas nefirma, momenta, iluzia. Ŝajna X-helpo signifas daŭran ignoron pro X. Ne parolante jam pri niaj membroj devenantaj el ĉiaj horizontoj.

Pro tio estas vivograve por niaj organizoj, ke eĉ por nia lingvo, fruktoj de tiom da klopodoj de pluraj generacioj da Esperantistoj de l'tempo de Zamenhof mem ĝis hodiaŭ kun niaj denaskaj Esperantistoj — estas vivograve, ke ni restu plene sendependaj kaj neniam ricevu niajn direktivojn elde politike, religie aŭ filozofie orientitaj samideanoj, aŭ kiel okazas nun en iuj landoj elde eksteraj instancoj. Hodiaŭ kaj tie en iuj landoj, morgaŭ tie ĉi en aliaj landoj; hodiaŭ pro politiko, morgaŭ pro filozofio aŭ religio; rigardu la nunan mondon kun siaj turmentoj kaj baraktoj; restu kun aperta kompreno kaj vido.

UEA devas resti libera de tiaj direktivoj, de kie ajn ili venas aŭ venos. Se ne, ankaŭ sur UFE pezos neesperantista pensomaniero.

Niaj organizoj estu sendepende Esperantistaj, se ni ne volas malaperi!

Esperanto mem estas en danĝero

Efektive, kiel vi mem, ankaŭ mi studis la projekton de nova UEA-statuto. Nu! La Prezidanto Humphrey TONKIN, malgraŭ siaj vortoj, ke UEA konservu la neŭtralecon, nete proponas ŝanĝon de l'kvar paragrafoj 4, 13, 16 kaj 21, kio en la faktoj nepre forigos neŭtralecon kaj do sendependecon. Kial li tiel mokas nin? Tia dulangeco estas karakteriza trompemo, kiu devus pensigi ĉiujn el ni! Cu entute TONKIN («subtila» en la rusa!) prenas nin por malsubtilaj homoj?

—oOJo—

Sekve, mi solene alvokas vin meti sur la agordon de l'proksima UFE-Kongreso la studon de tiu demando. Oni sciu almenaŭ la starbazon de UFE. La A-Komitatoj de UFE estu klare instrukciitaj en kiu senco voĉdoni en la Lucerna Kongreso.

La Kongreso devos respondi al jenaj demandoj:

- 1/ Ĉu UFE, asocio laŭ la leĝo de 1901, restas neŭtrala en ĉiuj demandoj pri politiko, filozofio kaj religio?
- 2/ Se jes, ĉu ĝi povas esti filio nur de internacia organizo, kiu respektas similan neŭtralecon?
- 3/ Se ankoraŭ jes, ĉu la Kongreso de UFE opinias, ke tio estas statute atingebla, se UEA konservas kaj respektas la kvar artikolojn 4, 13, 16 kaj 21 de l' ĝisnuna statuto?

—oOOo—

* *Aŭ la UFE-Kongreso voĉdonu NE al unu el tiuj demandoj kaj ankaŭ la iom-postioman MORTON de niaj organizoj kaj ankaŭ de l'Zamenhofa lingvo, lingvo de paco kaj frateco inter liberaj homoj. Ĝi aprobu la ŝanĝon de l' kvar artikoloj aŭ restu senlukte indiferenta al la ĝisradika detruado de l' neŭtraleco de UEA.*

* *Aŭ la UFE-Kongreso voĉdonu JES al ĉiuj tri demandoj, kiel saĝo kaj sana prudento postulas, kaj ĝi voĉdonas samtempe la VIVON de niaj organizoj kaj de nia bela, kara lingvo, homfratiganto kaj pacportanto. Ĝi rifuzu la ŝanĝon de l'kvar artikoloj, nun la solaj rigliloj, solaj armoj kontraŭ forigo de l'neŭtraleco, kontraŭ la entrudiĝo de ĉia diktaturo bazita sur ideologio religia, filozofia, politika aŭ alispeca laŭ la vento de l'historio... Ja svarmas ekzemploj en la kvin kontinentoj de hodiaŭ...*

Sen tiuj armoj
Post kelkaj jaroj
Restos nur larmoj,
Ankaŭ amaroj.

—oOOo—

Per tiu letero, mi kiu dediĉis miajn plej bonajn jarojn, mian tutan vivon al nobla movado — al ĝia diskreskado kaj disfloriĝo — mi solene alvokas vin!

Ne forgesu ankaŭ, ke unua la Spirito blovas; se mortos la Zamenhofa spirito, ĉio estos negative decidita, eĉ se efemeraj kaj ŝajnaj sukcesetoj ekflagros antaŭ gapantaj okuloj. Ne forgesu la sorton de l'Esperantistoj en najbara lando! Lekinte la botojn de l'tiamaj mastroj, ili hontinde perdis sian dignon kaj tamen subbote devis mem likvidi siajn asociojn kaj mem dispremiĝis. Sen libereco Esperanto ne povas vivi; nur atende vegeti ĝis reveno de l'triumfa libereco: ankaŭ tion ni samloke konstatis.

Ni ĉiuj kuniĝis ĉirkaŭ unu sola idearo: «*proponi fratecan lingvon al ĉiuj popoloj, ne entrudiĝante en iliajn internajn vivojn*». Respektinda idearo, sed ĝi ne rezistas al la kliniĝo antaŭ kiu ajn ideologio; ĝi nepre bezonas liberecon por vivi.

Vivu libereco kaj sendependeco de nia movado!
Ni levu la Spiriton, ni sekvu Zamenhofon!
Libera Esperanto en libera mondo!
La Esperantista Digno ne estu nura vorto!

Tuluzo, la 18-an de februaro 1979.

D-ro A. Albault

GRANDECOJ KAJ ETECOJ DE ESPERANTO

Antaŭ kelkaj jaroj okaze de vojaĝo tra Svislando mi deziris ekprovi, ĉu valoras Esperanto por laboro. Ĉar mi estas geriatro*, min interesis viziti klinikojn kaj instituciojn destinitajn por geolduloj.

En du urboj — kiujn nun mi ne nomos — mi sukcesis per Esperanto eniri tri ordinarnajn instituciojn, kiujn kutime oni ne montras ĉe oficialaj vizitadoj. Ja tiuj fleglokoj ne estas luksaj, sed ili estas tre funkciotaŭgaj laŭ la svisa sistemo ĝenerale bone elpensita.

Dank'al la lingvo mi povis intime min miksi en grupon de kelkaj kuracistoj kaj precepte esperantistaj geflegistoj kaj vidi ilin labori. Mia tempo kun ili bedaŭrinde estis maldaŭra; tamen, ĉar la ĉeflegisto sur unu loko kreis laborteamon diversnaciecan, kies lingvo estas Esperanto, mi notis, ke certe oni povas labori per Esperanto, sed ankaŭ ke tio estas grandeca aspekto de Esperanto!

—oOOo—

Entuziasmiĝinte de tiu «malkovro», mi skribis tre simplan artikoleton por montri la valoron de Esperanto en ordinara, ĉiutaga laboro. Evidente ne temis pri literaturo aŭ pri esperantologio... Eble pro tio interesataj de tiu artikoleto montriĝis nek UFE nek UEA!

Tamen la ĉiutaga vivo ŝajnas al mi same tiel grava kiel la literatura: eteca aspekto!

—oOOo—

En septembro 1977 mi vojaĝis tra ok urboj de Italio kaj Jugoslavio, kie mi konis nenium. Tamen ĉiuloke mi estis perfekte akceptita de lokaj esperantistoj, eĉ kiam mi ne povis anonci pri mia veno.

Jes, ĉiuloke mi trovis «amikojn», kiuj oferis sian tempon, scion kaj bonvolemon por helpi min, gvidi min... eĉ se foje mi iomete ĝenis ilin. Grandeca aspekto!

—oOOo—

Tiu travivaĵo refortigis mian entuziasmon, kaj mi decidis modestaskale revigligi intereson pri kaj por Esperanto sur la kampo de medicina laboro, kiu plej interesas min.

En la mezo de oktobro 1977 mi invitis dek kvin kolegojn el diversaj landoj orientaj kaj okcidentaj al tritaga, kvankam neoficiala, medicina kongreseto en urbeto apud Parizo. Loĝado kaj restoraciado estis tute senpagaj, ĉar cirkonstancoj tion ebligis al mi: nur la vojaĝo restis proprakosta por la partoprenantoj.

Mia deziro celis, ke eŭropaj kuracistoj, ne oficialuloj de esperantistaj organizaĵoj, sed ni diru: «bazaj kuracistoj» renkontiĝu kaj pridiskutu diversajn temojn; kaj ekzistas multaj temoj interesaj pri medicino en la nuntempa Eŭropo! Ŝajnis al mi tiam, ke eĉ malgranda, simpla kunveno de esperantistaj kuracistoj povos esti eventeto por la partoprenantoj kaj eĉ por Esperantio.

Nu, el la dek kvin kolegoj, al kiuj mi sendis leteron, nur kvar respondis: eteca aspekto!

—oOOo—

Ĉu estas konkludo?

Marcel DUPLAN
Marto 1978

* geriatro — kuracisto specialigita pri malsanoj de maljunuloj.

LASTMOMENTE

Laŭ la ĵus ricevita informo, la proceso kontraŭ Švâček kaj Srna, post ekzameno de deko da atestantoj, ĉiuj donintaj favorajn atestojn pri la du akuzitoj, estis prokrastita *sine die*, nome sen fikso de nova procestago. Komentoj en la sekvanta numero.

Mirinda Verko
de
Admirinda Homo



Je distanco de nuraj 4.5 kilometroj de Villafranca del Panadés kaj ĉ. 25 kilometrojn de Barcelono situas sur monteto en belega natura ĉirkaŭaĵo Sant Paul d'Ordal, pitoreska vilaĝo de kelkcento da loĝantoj. Sur la malgranda placo — la nemankebla centro de socia vivo en ĉiuj mediteraneaj loĝlokoj — troviĝas la same neforestebla kafejo kaj la kutimaj vendejoj. La someran varmegon mildigas ombro de arboj kun densaj foliaroj kaj freŝa venteto parfumita per odoroj de kamparaj floroj kaj herboj. Je kelkaj paŝoj, en la «ĉefstrato», estas la apoteko de Mag. Luis Hernández Yzal, ĉefdelegito de UEA por Hispanio. Fakte, tiu simpatia sinjoro, malalta kaj iom diketa, el kies vizaĝo elradias sincereco kaj bonkoreco, ne estas simple farmaciisto: en la tuta regiono li estas konata kiel «la farmaciisto» kaj, krome, kiel la fondinto kaj prizorganto de la Hispana Esperanto-Muzeo. Helpata ĉiurilate kaj profesie kaj en sia laboro por la Muzeo de sia sindona, ĝentila edzino, li kreis kaj plu evoluigas mirindan institucion, unu el la maloftaj veraj fajrujoj de esperantismo.

Laŭ la afabla invito de Mag. Hernández, mi vizitis Sant Paul d'Ordal kaj ĝian Muzeon la pasintan aŭguston, tuj post la brila kaj inspira 4-a Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Jaca. Sincere parolante, kiam mi akceptis la iom insistan inviton, mi tion faris ne tial, ĉar mi atendus trovi tie ian nepre vidindan Esperanto-institucion — la multjaraj spertoj de ofte troblovitaj bagatelajoj en la Esperanto-Movado ne estas kuraĝigaj tiurilate — sed unuavice por plezurigi vere karan personon, kiu — mi erare pensis — deziras montri ian sian flankokupon kolekton da personaj esperantajoj. Des pli agrabla estis la surprizo, kiam mi konstatis pri kio fakte temas.

La Muzeo, fondita en 1968, unue troviĝisen ampleksa ĉambro ligita al la apoteko de Mag. Hernández. Poste la fondinto konstruigis el propraj rimedoj tutan apartan domon nur por la Muzeo. La inaŭgura solenaĵo okazis en majo 1974 lige kun la 26-a Kongreso de IFEF en Taragono. En sia tuta historio Sant Paul d'Ordal kaj ĝia ĉirkaŭaĵo ne akceptis tiom da diversnaciaj eksterlandanoj, kiom dum tiu unusola tago, klarigas Mag. Hernández kun iom da prava fiero. Tiu eleganta, hela palaceto, ĉirkaŭita de florantaj arbedoj, troviĝas en Strato D-ro Zamenhof 12, daŭrigo de la placeto «Esperanto», je ĉ. cent paŝoj de la apoteko. Interne du grandegaj salonoj de ĉ. 200 kvadrataj metroj da spaco kun bretaroj plenaj de lernolibroj, gramatikoj, esperantologiaj studoj, originalaj kaj tradukaj literaturaj verkoj, binditaj jarkolektoj de Esperanto-periodaĵoj, gravaj eltondaĵoj de artikoloj diverslingvaj pri la lingva problemo ĝenerale kaj aparte pri la Internacia Lingvo, dokumentoj kaj libroj de la siatempa Centro de Esploro kaj Dokumentado (1952-1975), jarlibroj, kongresaj libroj, ktp. En apartaj ŝrankoj kun tirkestoj troviĝas diskoj, sonbendoj, filatelaĵoj, historiaj fotografiaĵoj, insignoj, glumarkoj kaj similaj objektoj. Ĉio estas tenata en perfekta ordo, taŭge klasigita. Centoj da turismaj prospektoj, komercaj reklamoj, flugfolioj kaj similaĵoj, bele aranĝitaj sur pluraj paneloj, flagoj kaj afiŝoj kompletigas tiun ĉi daŭre evoluantan, konstantan ekspozicion de vivanta esperantismo sub la nomo de «muzeo».

Flanke de la du interkomunikiĝaj salonejoj troviĝas kelkaj ejoj kaj ĉambroj, inter kiuj la kabineto, banejo kaj komforta gasteĉambro, en kiu la subskribinto loĝis dum tri tagoj.

La interno de la Muzeo estas same eleganta, kiel la eksteraĵo de la konstruaĵo. Ĉio — la tapetoj, la remburitaj seĝoj kaj apogseĝoj, la skribotabloj kaj aliaj mebloj — spegulas grandan artan guston, sindediĉon kaj la varman deziron de gesinjoroj Hernández krei veran juvelon de la Esperanto-kulturo. Kaj ĉion-ĉi realigis unusola persono per siaj rimedoj kaj per sia laboro, ofte profunde en la nokto, inspirita de la grandeco de Esperanto kaj de tiu nobla idearo de humaneco, kiu estas nedisigeble ligita al ĝi.

La Muzeo estas ne nur vizitinda, sed ankaŭ ĉiurilate subteninda kiel unu el la tre valoraj institucioj de la Esperanto-Movado, unuavice per sendado de ĉio iel valora en Esperanto aŭ rilatanta al ĝi je la adreso: *Strato D-ro Zamenhof 12, Sant Paul d'Ordal (Barcelona), Hispanio*.

La Muzeo povus esti bonege utiligata ankaŭ por okazigo de malgrandaj internaciaj konferencoj, aŭ de internaciaj seminarioj, simpozioj, altgradaj kursoj sur universitata nivelo pri esperantologio, literaturo, fonetiko, parolarto, historio de la Esperanto-Movado, la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj multaj aliaj demandoj, kiuj postulas daŭran pluan kaj plian studadon. En la du salonegoj estas sufiĉe da spaco por komforte lokigi kunvenojn de 20-25 personoj, eĉ pli se necese, dum en la proksima Villa franca del Panadés, siavice vidinda, troviĝas granda moderna hotelo kaj pluraj malpli grandaj. Espereble S-ro Hernández baldaŭ komencos realigadi ankaŭ tiun sugeston, kiun ni iom jam priparolis.

Al Mag. Luis Hernández Yzal tutkoran gratulon pro la impona verko nur pale jus prezentita, kaj al ambaŭ gesinjoroj, nun jam geamikoj, plej varman dankon pro la gastigo, senfina atentemo kaj la multnombraj ĝentilaj faritaj dum tiu memorinda restado en Sant Paul d'Ordal.

Ivo Lapenna

LA NEDERLANDA, HOLANDA KAJ LA AFRIKANSKA

La artikoleto de Herman Deceuninck (jan.-feb. 1979) atentigas pri la konfuzo, pli malpli intenca, kiun vekas en Belgio la vorto «Holanda», kontraste kun la preferinda «Nederlanda».

Kun lia vidpunkto mi konsentas, kadre de la speciala problemaro ekzistanta en lia lando. Aliflanke tamen restas fakto, ke la kulturlingvo pri kiu temas ja ŝuldas multon precize al la provinco Holando en Nederlando. Ankaŭ en Sud-Afriko, kun aliaj cirkonstancoj ol en Belgio kaj absoluta malesto de ĉikanuloj francemaj, oni iam nomis tion la Holanda.

Eĉ la Afrikansa, jam memstara kvankam parenca lingvo, iafoje (sed ne ofte) portis tiun nomon antaŭ kelkaj jardekoj. Tiam oni kutimis paroli pri la Nederlanda kiel la «Alta Holanda», por distingi la du idiomojn. Tamen emfazendas, ke en Sud-Afriko tiaj terminoj jam plene eksmodiĝis. Restas nur la nomoj la Afrikansa kaj la Nederlanda.

Espereble la Belgoj Franclingvaj baldaŭ ĉesigos sian stultecon kaj rekonos la faktojn pri la ekzisto de unu lingvo Nederlanda, maluzante la misan terminon «Holanda».

Deceuninck plie atentigas pri tio, ke la Nederlandan parolas ĉirkaŭ 20 milionoj da homoj, kio igas ĝin lingvo mezgranda, kun pliaj uzantoj ol la Dana, la Norvega kaj la Sveda kune. Tial ke lia komparo enkalkulas tri lingvojn parencajn unuflanke, permesblas ĉi-cele aldoni al la Nederlanda ankaŭ la Afrikansan. Ĝin parolas verŝajne 6 milionoj da personoj.

Tio inkluzivas ne nur homojn blankajn sed ankaŭ 2,5 milionojn da miksrasuloj, por kiuj la Afrikansa estas gepatra lingvo. Eĉ inter la nigraj loĝantoj de Soweto nuntempe multaj el la junularo, kvankam ribelemaj kontraŭ la blanka registaro, tamen uzas parolformon kun bazo Afrikansa, enhavantan ankaŭ vortojn Bantujajn kaj Anglajn. Preter tio menciindas, ke la indigenaj lingvoj ne nur de la Sud-Afrika Respubliko sed eĉ de la ĉirkaŭa landaro multe riĉiĝis per pruntaĵoj el ĝi.

La ĉefaj diferencoj inter la Nederlanda kaj la Afrikansa estas, ke ĉi tiu enhavas vortojn diferencajn aŭ alisencajn, apud multaj komunaj, kaj precipe simpliĝis per forĵeto de la genro gramatiko kaj ŝanĝita verbosistemo. Kiel en Esperanto ekzistas samaj formoj por ĉiuj personoj. La pasintaj tempoj reduktiĝis al unu, kvankam ne mankas manieroj esprimi la nuancojn tiurilate, precipe per adverboj kaj la ĉirkaŭteksto. Ankaŭ tio similas la metodon de Esperanto, almenaŭ en la stilo kiun preferis Kabe kaj liaj sek-vantoj.

La tutan lingvofamilion al kiu apartenas kaj la Nederlanda kaj la Afrikansa — kune kun siaj variantoj — oni priskribas per la vorto «dica».

Edwin de Kock

MAREKTE, MALSÂĜE KAJ DEFLANKIĜANTE NI PERDUS LA VOJON CELITAN

Jam de kelka tempo, el la paĝoj de la revuo «Esperanto», organo de U.E.A., likiĝas gutetoj de nedifinebla intenco.

En la n.^o 867^a, antaŭ unu jaro, Verloren van Themaat en sia recenzo pri la monumenta verko de Edo Bernasconi «Esperanto aŭ Interlingua? Faktoj kaj Teorioj nontraŭ mitoj kaj antaŭjuĝoj» (1) skribis: «Li (Bernasconi) troigas la dependecon de la kritiko pri Esperanto — fare de Interlingua-anoj — de la «filozofio» de Interlingua; li preteratentas, ke kelkajn trajtojn kritikatajn de Interlingua-anoj kaŭzis ne la «filozofio» de Esperanto, malsama al tiu de Interlingua, *sed simple la lingvistika malsperteco de Zamenhof* (2). Ekz., Ric Berger, en «La construction d'une langue internationale moderne» (1967^a) prave kritikas la afikson IG, ĉar ĝi troviĝas nur en kelkaj germanaj formajoj kaj aliaj afiksoj por la sama funkcio estas multe pli oftaj en la etnaj lingvoj. Tiaj kritikoj cetere *pravigas ne planlingvon tute malsaman al Esperanto, sed planlingvon sam-* bazan al Esperanto diferencantan de ĝi en kelkaj detaloj» (2).

En la n.^o 871^a aperis anonco pri la «Optimala Esperanto-Ortografio» de A. Lienhardt, kaj kvankam Boris Kolker en la n.^o 877^a prezentis tre adekvatan forpuŝan recenzon, krome sciigante ke Lienhardt ŝanĝis ne nur la alfabeton sed ankaŭ ĉirkaŭ kvar mil radikojn kaj eĉ la nomon Esperanto al «Unal», *la libroservo de U.E.A. vendas ĝin!!*

Lienhardt estis tentita redraŝi la grenon jam eldraŝitan, ne atentante ke unu parto de Eŭropo ne ampleksas la tutan mondon, kie milionoj da homoj ne havas latinan alfabeton, kiun kelkaj eŭropanoj erare imagas universalaj. Kion povas signifi kvin super-signoj, al uzantoj de la rusa, araba, hebrea, greka, ĉina, japana...?

En la j. 1905^a S-ro Javal postulis ĝian reformon (3). S-ro Jaume Grau, vicprezidinto de nia Akademio, ĉirkaŭ la j. 1946^a, en sia lasta vivofazo (kun hemiplegia lezo) disvendis sian libron por presado de «poxtkartoy» sur kiuj presisto, balailon en manoj, balaadis la ĉapelitajn literojn. Li koliziis kontraŭ la indiferentecon kaj kiel poeto li abunde versadis kolere kaj moke laŭ tiu specimeno:

«Sub la sanktega nomo de Esperanto
min piedpremas la piedo de elefanto.»
«Oni pretendas min hereza
samkiel oni diris min freneza.»

«Regule kaj respektu mi proponis
sed respondon al mi neniu donis,
kaj faris min pestul' sen tradicio
aŭ viktimo de verda inkvizicio.»

Sekvis la usona pastro Kubacki, kiu ĉirkaŭ la 1954^a, en sia «Resumo de Kialoj» (plena je eraroj) skribis: «*Se Zamenhof en sia nesciado kaj nesperteco provis altrudi al la homaro tiujn grandajn malfacilaĵojn...*» (2) kaj eĉ petis la helpon de Dio kontraŭ nia alfabeto.

Alia konkurinto estas Retot (S-ro Verdo), kiu ŝanĝis eĉ prepoziciojn. Pli poste aperis Teodor Lahago, aŭtoro de «Moderna Esperanto», kiu ne nur eliminis la ses ĉapelitajn literojn, sed ankaŭ la tri C.F.Z., tiel ke kun la W restis nur dudek literoj. Kaj jen la perfekteco: Dum Zamenhof skribis Ĉ, Grau skribis CH, Lahago SJ, Kubacki Q, Retot eliminis ĝin, kaj Lienhardt... estas ne grave, ĉar kiom da kapoj, tiom da ĉapoj.

En la n.^o 875^a, en la artikolo «Eŭropa integriĝo kaj lingva justeco» la redaktoro diras: «...kvankam la ĉi-tie aperanta studoparto tuŝas iujn en la Movado «tabuajn» temojn — la ellasita tekstoparto faras tion eĉ pli okulfrape (ekzemple, ĝi enhavas proponojn por «plibonigi» Esperanton) — mi opinias, ke estas utile prezenti al la legantaro de nia revuo la manieron en kiu oni ekster la Movado argumentas favore al Esperanto».

Nu, ĉu oni favoras Esperanton proponante reformojn, asertante ke aliaj planlingvoj estas same maturaj kiel Esperanton, ke la ekzisto de aliaj planlingvoj estas utila al ĝi? Ĉu do neniom valoras la naŭdek-jara vivo de nia lingvo, la miloj da libroj, la kongresoj, la konferencoj, la kunvivado de homoj malsamnaciaj, la fakto ke inter ni estas homoj, kiuj jam de sia juneco parolas Esperanton pli korekte ol la propran lingvon, la... kaj la...?

La tiel nomataj planlingvoj estas fakte nur projektoj neniam vivintaj, kies konateco estas ŝuldata nur al Esperanto. Ekster nia sfero, nenia projekto prosperas, kaj la projektoj malkongruas reciproke. Tial kaj precipe tial oni atakas nian konsekvencon forpuŝon de tiuj kaj tiaj ruinigaj provoj, kiujn laŭ la deviantoj, ni konsideras tabuoj... (en la paĝoj de «Esperanto», la organo de U.E.A.).

Kontraŭ tiel nekonsekvenca esperantisteco, jam makulita de politiko, ni firme gardu nin, car

eĉ muso malgranda, konstante ronĝante
subfosus montegon granitan.

Salvador Gumá

(1) Vidu mian recenzon en n.^o 15-a de Horizonte. (2) Substreko mia. (3) Leteroj de Zamenhof.

ESPERANTO, KANDIDATO POR LA ROLO DE KOMUNA EŬROPA DUA LINGVO

Prof. d-ro Gyula Décsy, eminenta lingvisto ĉe la universitato de Hamburgo, skribis fundamentan eruditajn libron pri la lingvistika strukturo de Eŭropo (Die linguistische Struktur Europas, Wiesbaden 1973). En tiu verko li vaste kaj detale esploras en du ĉapitroj ne nur la pasintcon kaj la nunecon de sesdek-du Eŭropaj lingvoj kaj la problemojn de ilia kunekzistado, sed li dediĉas ankaŭ trian por ĉiu Esperantisto interesegan ĉapitron al la lingva estonteco de Eŭropo.

Nek estas ĉi tie la loko nek estas mia intenco ripeti la preskaŭ spiron rabantajn futurologiajn eldirojn de prof. Décsy pri la lingva sorto de nia multfaceta kulturriĉa kontinento. Kiu vivos, vidos... Grava ŝajnas al mi lia opinio pri nepre bezona komuna Eŭropa dua lingvo. Regionaj duaj lingvoj ja ekzistas. Kiel tiaj funkcias ekzemple la Rusa, la Angla, eĉ la Germana, la Franca kaj la Sveda. Sed Eŭropo ja bezonas, nepre bezonas komunan duan lingvon. Laŭ prof. Décsy nun ekzistas ses kandidataj lingvoj por estonte plenumi tiun taskon, nome la Angla, la Franca, la Germana, la Internacia (Esperanto), la Latina kaj la Rusa. Nu, mi ne multe kontraŭstaras al la Germana. Tamen mi ne multe amas aŭdi ĝin el la buŝoj de tiaj homoj por kiuj ĝi estas la dua lingvo, kiuj penegre lernis ĝin kiel dua post sia denaska lingvo kaj kies preskaŭ neevitebla fuŝprononco kaj misapliko rilate al iom pli delikate nuancitaj esprimmanieroj kaj Germanaj idiotismoj streĉus mian paciencon kaj ŝokus mian lingvan sentemecon. Mi ankaŭ restus Esperantisto pro la komunikado kun la ekster-Eŭropa mondo.

Rilate la Francan, la Anglan kaj la Rusan, mi energie protestus, kaj — pri tio mi estas absolute certa — tion farus ĉiuj la koncernan lingvon ne jam parolantaj etnaj grupoj, se io tia reale trudiĝus al ilia ĉiutaga vivo. Nur sensignifaj minoritatoj, prefere pro snobismo, eble estus pretaj sin submeti. En la numero 1642 de Heroldo de Esperanto mi legas, ke «oni rimarkas en la Nederlandaj politikaj medioj grandan maltrankviliĝon pro la minacanta malaperigo de la Nederlanda lingvo el Eŭropaj instancoj». Tio estas unu el multaj, eble ne tre grava, tamen pripensinda meneteklo. Sed ni lasu tion kaj returnu al la lingvokandidatoj por Eŭropo. Restas do la Internacia kaj la Latina. Kvankam prof. Décsy atribuas al ambaŭ lingvoj egalajn ŝancojn antaŭ la Franca, la Germana kaj la Rusa, mi pri tio nur povas ridi. Mi multe ŝatas la Latinajn lingvon kaj literaturon, sed mi opinias tute ne verŝajne, ja, tute ne eble, ke la Latina fariĝos komuna Eŭropa dua lingvo. Ĝi estas multe tro malfacile lernebla kaj ĝia sinteza strukturo tro fremda al la modernaj penskutimoj. Oni devus ĝin simpligi, ĝian lernadon faciligi, ĝin normigi, ĝin konformigi al niaj modernaj bezonoj kaj vivkondiĉoj kaj tiel oni... finvenus al io ekzakte simila kiel la jam ekzistanta Internacia Lingvo. Tion tre frue kaj tre trafe ekkonis papo Pius XII (1876-1958): «Mi antaŭdiras al Esperanto en la estonteco de la civilizacio lokon similan al latino en la mezepoko». (Isaj Dratwer, Pri Internacia Lingvo dum jarcentoj, Tel-Avivo 1977, p. 196.)

La unika ne utopia solvo de la Eŭropa lingvoproblemo estas la komuna ekuzo de la jam de multaj naciaj minoritatoj multflanke aplikata Internacia Lingvo. Estas nun instrue vidi, kion pensas profesia lingvisto pri tiu lingvo, en kiu li mem nur vidas unu el ses eblaj aspirantoj por la rolo de komuna Eŭropa dua lingvo.

Prof. Décsy mencias la organizon de la Esperanto-movado, la Universalan Esperanto-Asociation kaj la Esperanto-Akademion. Pri la Internacia Lingvo li diras, ke ĝi estas la plej bone funkcia monda helplingvo. Tio supozigas, ke ekzistas aliaj malpli bone funkciaj, tamen eble konkurantaj helplingvoj. Estas nepre direnda, ke tiaj de eĉ nur plej malgranda graveco ne ekzistas.

Prof. Décsy taksas la nombron de la Esperantistoj en nura Eŭropo je dek ĝis dekdu milionoj da homoj. Tio signifas, ke pli da homoj parolantaj Esperanton ekzistas ol homoj, kiuj parolas aŭ Albane, Armene, Baske, Baŝkire, Beloruse, Bretone, Bulgare, Cigane, Ĉeĥe, Ĉeremise, Ĉuvaŝe, Dane, Estone, Feringe, Frise, Gagaŭze, Greke, Irlande, Islande, Jide, Jurake (Zamojede), Kalmuke, Karaime (Karee), Kaŝube, Kimre, Ladine, Lapone, Letone, Litove, Livone, Luksemburge, Macedone, Malte, Moldave, Mortvine, Norvege, Portugale, Romanĉe, Sirjene, Skote-Gelike, Slovake, Slovene, Suomie, Svede, Tatare, Turke, Vepse, Vote, Votjake aŭ Zorbe. Iun konatulon, kiu lernus iun el tiuj lingvoj, oni rigardus kiel speciale kleran, eble kiel aparte interesan homon, sed oni ne taksus lin aparta strangulo. Kaj ĝuste tio ankoraŭ tre ofte okazas, se iu decidiĝas lerni Esperanton.

Prof. Décsy plue indikas, ke ankaŭ en transoceanaj landoj la Internacia Lingvo havas konsiderindan anaron. Li tamen dubas, ĉu Esperanto pro ĝia Hindeŭropeco (li tiurilate parolas pri «Eŭropa paroĥismo») ankaŭ estas bonvena al la grandaj popoloj de Azio kaj Afriko. Nu, ĝis nun ja ekzistas neniam indikoj pri la kontraŭo. Almenaŭ en Azio oni vigle salutas la perfektan aglutinan strukturon de Esperanto. Krome, ne malmulte da vortoj enpenetris en ĝin el ne Hindeŭropaj lingvoj kaj pliriĉigis, pliinternaciigis ĝin. Sed eĉ, se lia dubo prave ekzistus, tio ja ne estus, kiel li mem koncedas, maloportunaĵo por specifa Eŭropa komuna dua lingvo.

Mi ne dirus, kiel tion faras prof. Décsy, ke la Internacia Lingvo estas muntita precipe el la Itala kaj la Germana. Ĝia bazo estas multe pli vasta. Ĝi estas komponita el la materialo de la tuteco de la Hindeŭropaj lingvoj. Per sia regulo dek-kvin ĝi krome estas aperta al ĉiuj lingvoj de la mondo. Ankaŭ el la ne-Hindeŭropaj lingvoj ĝi asimilis grandan vortprovizon. Originas ekzemple el la Araba «algebro», el la Acteka «tomato», el la Ĉina «teo», el la Egipta «oazo», el la Eskima «kajako», el la Ĝuarana «ananaso», el la Haitia «jukao», el la Hungara «gulaŝo», el la Japana «harakiri», el la Karaiba «kanuo», el la Malajzia «gongo» el la Suomia «saŭno», ktp. multaj aliaj vortoj kaj el ankoraŭ aliaj lingvoj.

Plue oni legas ĉe prof. Décsy, ke la vokalismo de Esperanto estas ne-reduktanta, ke tio signifas, ke ĉiuj kvin vokaloj troviĝas ankaŭ en ne-akcentitaj silaboj, ke pro tio por Germanoj, Francoj, Angloj kaj aliaj ties prononco estas iomete stranga. Mi neniam aŭdis, ke iu el tiaj lingvanoj nur iel iam sentis ian penon alkutimiĝi al tiu «strangeco». Mi ankaŭ ne kredas, kiel asertas prof. Décsy, ke Germanoj kaj Italaj opinias Esperanton malbonigita formo de sia gepatra lingvo. Al mi almenaŭ neniam venis tiu ideo, kaj Germano mi estas.

Parolante pri la diakritaj signoj de Esperanto, prof. Décsy diras, ke ili laŭ moderna koncepto estas nenecesaj kaj kontraŭ ĉiu tradicio. Por ambaŭ certigoj mankas la pruvoj kaj mankas ankaŭ propono, kiel oni do laŭ pli bona maniero anstataŭigu la funkcion de la diakritaj signoj. La aŭtoro jam aliloke (Europäische Hochsprache, Gerlingen 1979, ĉapitro 16) skribis pri tiu prae malnova temo. Li ĉi tie ne ripetu sin.

La gramatiko de Esperanto estas, kiel indikas prof. Décsy, analiza. Tio estas ĝusta. Oni tamen ne pretervidu, ke ekzistas ankaŭ eblecoj kaj tendencoj de sinteza esprimmaniero. La leganto bonvolu kompari: mi estas dirinta = mi diris; mi estus dirinta = mi dirintus; ejo por malsanaj uloj = malsanulejo; ĝardeno de domo en la antaŭa urbo = antaŭurba domĝardeno; kun rapideco de fulmo = rapide kiel fulmo = fulmrapide; kun zefiraj flugiloj = zefirflugile. La Internacia Lingvo estas rimarkinde fleksebla. Ĝi permesas kaj analizajn kaj sintezajn parolturnojn.

Inter aliaj oportunoj de la Internacia Lingvo, kiel ekzemple ĝia konformeco je la modelo «SAE» (Standard Average European), prof. Décsy akcentas ankaŭ ĝian neŭtralecon, kiu garantias, ke ĝi kiel komuna Eŭropa dua lingvo ne minacas la nacian ekzistadon eĉ de la plej malgrandaj popoloj, ke ĝi pli vere tiun garantias. Kiel atestanton li citas la Suomian lingviston Paavo Ravila (naskita 1900), kiu pledas por «artefarita» lingvo, sed kiu tre malĝuste kontraŭstarigas ĝin al la «vivantaj» lingvoj, kio implicas, ke «artefarita» egalas al «senviva». Esperanto tamen estas eminente vivanta lingvo. Paavo Ravilo devus diri «etnaj» lingvoj anstataŭ «vivantaj».

Konklude prof. Décsy, laŭ mia elgermanigo, diras: «Esperanto posedas bonegan internacian organizon por instruado, kiu plilarĝigita kaj konforme provizita — povus en plej mallonga tempo gajni la «lingvobatalon» en Eŭropo. En Esperanto troviĝas la plej multaj lingvoplanaj eblecoj por Eŭropa dua lingvo: «Ĝis tie, tre bone!». Poste li sufiĉe arkane kontinuas: «La necesaj ŝanĝoj de la interna strukturo povus esti efektivigitaj sen konfliktoj kaj sen kontraŭdiroj de la naciaj kontrolinstancoj. Esperanto estas ne-bela, sed tre utila lingvo, ne detruenda kaj kiel plasto formebla».

Pri ŝanĝoj prof. Décsy verŝajne ne parolus, se li estus studinta la historion de la Esperanto-movado, se li disponus pri pli intima kono de la lingvo kaj se li pli bone ekkonus la internan meĥanismon de la Internacia Lingvo pri memregulado, ĝiajn fortajn tendencojn al asimilado kaj eliminado, kaj se li konus la strebadon de la Esperantistaj verkistoj al klareco, al logiko kaj al beleco. Laŭ la eldiroj de prof. Décsy mi iomete dubas pri liaj sufiĉaj konoj de Esperantologiaj problemoj, do pri lia kompetenteco en aferoj koncernantaj Esperanton. Li tamen havas la meriton inter profesiulaj lingvistoj raran entute okupi sin pri Esperanto kaj eĉ favore paroli pri ĝi.

«De gustibus non est disputandum.» Mi senreserve taksas Esperanton belega lingvo. Mi opinias ekzemple la Zamenhofan «Ho, mia kor'» ne nur kortuŝa kaj modele simpla, sed ankaŭ bela, tre bela poezio.

Rikardo Sulco, FRG-MINDENO

PROVIZORA ADRESO DE PROF. I. LAPENNA

Prof. D-ro I. Lapenna pasigos unu trimestron — de la mezo de majo ĝis la mezo de aŭgusto — kiel gastprofesoro en la Jura Fakultato de la Universitato de Sydney. Dum tiu periodo li ne povos korespondadi, sed en vere gravaj kaj urĝaj aferoj oni povas skribi al li je la adreso: Prof. Dr. Ivo Lapenna, Visiting Professor, Faculty of Law, The University of Sydney, 173-175 Phillip Street, Sydney, NSW 2000, Australia.

PLIAJ HONTINDAJ KALUMNIOJ DE "HEROLDO"

Noto: Laŭ letereto de 21.2.79, Profesoro Lapenna sendis ne nur al «Horizonto», sed ankaŭ al pluraj aliaj Esperanto-gazetoj sian reagon kontraŭ la plej lastdataj mensogoj de «Heroldo», atencaj al la plej elementa ĵurnalista etiko. Ne sciante, pro la nuna silentado de la vero, ĉu aliaj periodaĵoj lojale aperigos la reagon, la redakcio de «Horizonto» publikigas ĝin komplete, kaj esprimas samtempe sian indignon pro tiu plia hontinda misago de «Heroldo», ranganta profunde sub la nivelo de ĵurnalista honesteco, kaj sian admiron al Prof. Lapenna pro lia fakteca, trankvila defendo de sia nomo, alte respektata de ĉiu sincera persono en la Esperanto-Movado kaj ĉie ekster ĝi. — La Redakcio.

Konato sendis al mi fotokopion de artikoleto «Ĉu detrui Lucernon?», publikigita en n-ro 4/79 de «Heroldo de Esperanto» de la 16-a de januaro 1979. En ĝi la geredaktoroj de tiu vulgara gazeto, kiun mi jam delonge ĉesis abonadi kaj legadi, atakis iun «postnoton», aperintan en la decembra n-ro de «Perspektivo», organo de la Dana Agadgrupo de la Neŭtrala Esperanto-Movado, kaj asertas, ke tiu postnoto «enhavas implicitan instigon al denunco».

Ĉar mi nek verkis tiun «postnoton», nek respondecas pri la enhavo de «Perspektivo», mi lasas al «Perspektivo» reagi, se ĝi trovas tion necesa, je tiu denunco pri «implicita instigo al denunco». Sed «Heroldo» perfidus sin mem, se ĝi ne utiligus la okazon por tuj elverŝi pliajn plej fiajn kalumniojn pri mi persone. Jen kion ĝi skribas:

«Se oni scias, ke la bulteno /t.e. «Perspektivo», mia rim./ estas inspirita de la antaŭa prezidanto de UEA, kiu ripetadas, ke nia movado fariĝis komunista ekde kiam li ne plu estas prezidanto, oni pli bone komprenas la situacion. La sama persono akuzis jam UEA esti komunista organizaĵo al la dana televido kaj en artikoloj aperintaj en tre gravaj gazetoj en Usono, Francio kaj en aliaj landoj.»

«Kompreneble, ĝis nun neniu pruvo estis donita: neniu tribunale akceptita dokumento aŭ atesto, neniu spuro de mallegalaj elektoj, neniu indiko, ke la agado de nia Movado sekvas partian vojon, nenio. Nur kalumnioj.»

En la supra teksto estas precize tiom da mensogoj, kiom da asertoj:

1. «Perspektivo» ne estas inspirita de mi, sed laŭ sia tuta enhavo ĝi estas inspirita — same kiel ĉiuj publikaĵoj kaj agadoj de la neŭtrala Esperanto-Movado — de la tradicia zamenhofa esperantismo, t.e. de humaneca internaciismo ligita al Esperanto.

2. Mi nek «ripetadas», nek iam diris, ke «nia Movado fariĝis komunista». Mi diris, pruvis per amaso da citaĵoj el originalaj dokumentoj en «Hamburgo en Retrospektivo», kaj daŭrigas pruvadi en «Horizonto», ke la kontraŭneŭtraleca konspiro en UEA (ne en «nia Movado»), la hamburga puĉo kaj diversaj partipolitikaj agadoj en granda parto de UEA mem ekde tiam ĝis la nuna momento troviĝas sub decida influo de ekstermovadaj partipolitikaj faktoroj en la eŭropa parto de la soveta bloko, kiuj donas devigajn instrukciojn kiel agadi al siaj Esperanto-instancoj («landaj asocioj»!!) kaj al iliaj komitatanoj en UEA. Tial UEA perdis siajn sendependecon kaj laŭstatutan neŭtralecon. La forigo en la nova statutprojekto de la esenca klaŭzo de la art. 13 de la Statuto de la Asocio ankoraŭfoje kaj tute klare konfirmas tion. Laŭ la klasigo donita de la nuntempa politika scienco, UEA ne povas esti rigardata kiel «komunista», sed nur kiel unu el la t.n. «transmisiaj rimenoj», t.e. organizaĵoj utiligataj por propagando ne de ia abstrakta «komunismo» (kia, cetere?), sed tute konkrete de sovetismo en ĉiuj ĝiaj politikaj aspektoj.

3. Mi tion diris kaj pruvis ne ekde kiam mi «ne plu estas prezidanto», sed, inverse, mi ekŝigis el ĉiuj funkcioj en UEA ekde kiam UEA fariĝis «transmisia rimeno» en la ĵus menciita senco.

4. Mi ne nur ne «akuzis UEA esti komunista organizaĵo al la dana televido... ktp.», sed nek havis nek havas kian ajn kontakton kun la dana aŭ kiu ajn alia televido, aŭ kun kiu ajn grava aŭ negrava nacilingva gazeto, kiu prezentis aŭ menciis tiun tutan katastrofan situacion en UEA. Tio estas unu afero. Tute alia afero estas, ke tuj post Hamburgo, eĉ antaŭ ol la kongresanoj povis atingi siajn loĝlokojn, almenaŭ parto de la vero pri la hamburgaj eventoj disfamiĝis en seriozaj medioj ekster la Esperanto-Movado. Verŝajne eĉ «Heroldo» ne estas politike tiel naŭva por pensi, ke ne ekzistas ekster la Esperanto-Movado respondecaj ĵurnalistoj aŭ specialistoj pri politikaj sciencoj kaj internaciaj rilatoj, kiuj sekvas kaj analizas la eventojn en gravaj neregistaraĵoj organizaĵoj (NRO-j), inter kiuj troviĝis la ĝishamburga UEA. Verŝajne «Heroldo» estas informita almenaŭ pri la longa artikolo, publikigita en n-ro 10/76 de la ĉefa soveta jura periodaĵo «Sovetskoe Gosudarstvo i Pravo», en kiu estis aperte rekonite, ke tuta aro da NRO-j en konsultaj rilatoj kun UN/Unesko estis lastatempe «ekkaperitaj» (v. HeR,

p-oj 139-141). En tiaj kondiĉoj necesis, ke la partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado, *fidela al la klaŭzoj pri neŭtraleco en la Statuto de UEA*, distancigu sin de la kontraŭstatuta politikigo de UEA sub la posthamburga gvidantaro. La tiusencaj intervjuoj kaj artikoloj de kelkaj esperantistoj kontribuis al precizigo de la vero kaj estis *utilaj por la lingvo kaj por la Esperanto-Movado*, ĉar ili montris, ke ne ĉiuj en UEA kaj ekster ĝi per silento konsentas kun la rolo de UEA kiel «transmisia rimeno». Siavice tio ebligas pluan laboron por Esperanto «sur neŭtrala lingva fundamento», en tiu ĉi kunteksto ankaŭ partipolitike neŭtrala movada fundamento. Tamen, laŭ «herolda dialektiko» ne la intrigoj, en kiuj ĝi mem partoprenis, la politikaj konspiroj kaj puĉo, kiuj kaŭzis la kontraŭstatutan politikigon de UEA kaj la nunan situacion, sed la diskoniĝo kaj la postaj objektivaj informoj pri la vero estas atakataj. Laŭ la sama «dialektika» inversigo de la kaŭzoj kaj sekvoj, ne la mensogo, trompo, eĉ krimo estas kondamnindaj, sed kondamninda estas la senmaskigo de la mensogo, trompo, eĉ krimo.

5. Kompreneble, ĉio dirita en «*Hamburgo en Retrospektivo*», en miaj artikoloj kaj aliaj tekstoj estas absolute vera. Nur personoj, kiuj ne legis aŭ ne volas legi la menciitan verkon kaj la aliajn dokumentitajn materialojn povas kredi al la plia kalumnio, ke «neniu pruvo estis donita... ktp.». Miaj skribaĵoj pri tiu tuta afero ja entenas gravan akuzon rilate la karakteron de UEA sub la posthamburga gvidantaro. Se la nuna gvidantaro aŭ «Heroldo» mem opinias, ke unusola el la centoj da dokumentitaj faktoj estas malĝusta, ili jam delonge akuzus min antaŭ kompetenta kortumo. Ili ankoraŭ havas tempon fari tion, se ili kuraĝas alfronti la kortumajn sekvojn de la vero. Tiam «Heroldo» havos ankaŭ sian «tribunale akceptitan dokumenton aŭ ateston».

Jam 16 jarojn la proprietuloj de «Heroldo» klopodis kaj plu klopodas nigrigi miajn nomon kaj laboron per centoj da kalumnioj, ofendoj, insultoj en artikoloj, cirkuleroj, «privataj» leteroj, eĉ telegramoj. Ĉu ne estus jam tempo, ke la seriozaj personoj en la Esperanto-Movado fine komprenigu al la proprietuloj sian firman malaprobon ne per iaj protestoj, neniam publikigitaj, sed per konkretaj agoj? Tiu tuta multjara, sistema kampanjo de mesogoj kontraŭ homon, kiu sindediĉe donis pli ol 50 jarojn de sia vivo al progresigo de Esperanto kaj de la Esperanto-Movado, kaj daŭrigas tion fari, estas ne nur hontinda, sed ankaŭ hontiga por la tuta Movado.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

NOVA KURSO DE ESPERANTO

Post grava agado de la Helena Supera Esperanto-Instituto, ĉe la Organizo de Grekaj Fervojoj, estas starigitaj du kursoj de Esperanto por fervojistoj.

La kursoj, kiujn partoprenas 50 personoj, okazas en salono de la Organizo, kaj ilin gvidas gesinjoroj S. Sakellaropoulos. Ni deziras al ili sukcesan laboron.

DONACIOJ POR «HORIZONTO» - 1979

Salvador Gumá, Reus (Hispanujo)	500 ptoj.
Ivo Lapenna, Londono	500 »
Juan Bruno, Villanueva i Geltrú (Hispanujo)	250 »
S. Siedl, Salzburg-Aigen (Austrujo)	200 »
G. Garcia Alvaro, Madrid	100 »
Günther Becker, Blieskastel (Germanujo FR)	1.000 »
Friedrich Busse, Hannover (Germanujo FR)	200 »
Franz Liebl, Fauerbach (Germanujo FR)	1.000 »

Helmut Sonabend, Peine (Germanujo FR)	1.000 »
W. Wingen, Köln (Germanujo FR)	200 »
J. Tallón, Burlada (Hispanujo)	100 »
F. Nathias, Sologny (Francujo)	500 »
Yvonne Mailet, Corneilles en Parisis (Francujo)	1.200 »
Maurice Crochet, Epernay (Francujo) ...	1.200 »
A. Blondeaux, Loctudy (Francujo)	150 »
W. Kaukal, Neustadt (Germanujo FR) ...	1.000 »
	9.100 »

Ĉiu sincera esperantisto, por kiu la sorto de UEA ne estas indiferenta, devus informi pri la faktoj el la sola objektiva fonto: *Hamburgo en Retrospektivo*. (V. la anoncon sur la lasta kovrilpaĝo).

Horacio 1, 4

Velkis la vintra akrec', ĉar printempo kaj Zefir' revenis,
maŝinoj tiras sekajn kilojn maren.
Nun forlasas la brut' la stalojn, la kampul' la fornon,
jam ne je prujno la herbejoj blankas.

Jam direktas Venus' la ĥorojn sub la hela luno,
kaj kun la Ninfoj la Gracioj ĉarmaj
piedbatas nun la teron, dum inspektas arde
Vulkan' Ciklopojn streĉe laborantajn.

Kronu nun verda mirt' la kapon brile parfumitan
aŭ flor' de l' tero ree noviginta.
Nun ni oferu al Faŭn' en ombra arbaret' ŝafidon
laŭ gust' aŭ kapron se li ĝin preferas.

Frapas la pala mort' egale je l' palacoj reĝaj
kaj povraj domoj. Ho, Sesti' feliĉa,
malpermesas al ni la etdaŭra viv' esperon longan.
Jam nokt' vin premas kaj la ombraj Manoj

kaj la senĝoja dom' de Plutono; tien se vi iris
vi nek kubludos pri la festestredo,
nek admireblos Lid', la dolĉa, kiun ĉiuj knaboj
adoras nun kaj baldaŭ la knabinoj.

Esperantigis
Friedrich Coburger
Oldenbur, GFR.

Printempa bildo

La urbaj stratoj deliras ekstaze
printemposopire cirkulas la sango homa
en mia brusto kaŝiĝis doloro
Brakumu la sunon, mizerulo,
eltrinku glason da suko petala
ebriiĝu de l'propra feliĉo.

Ĉu ne vidas vi?
Printempa girlando
ornamas
la koron de l'homar'.

Zora Heide

LA FEMME FATALE

Kun fata nudeco kvazaŭ plena de erotomanio
vagas la femme fatale;
per ŝtelitaj akvogutetoj sin banas narkote
dum juneca roso aspergas freŝan, glacian spiron
sur kapetojn de herboj kaj floroj.

Lazure bluiĝas la natur'.

Kun la ritma avideco ŝi luletas la spican talion
kvazaŭ frumatura mateno marŝanta al la sunparado.
Tra la fenestro de mia soleco mi inspektas
la eksteran mondon en kiu ŝi tirane regas,
kaj prodige pluvgutetas sangon sur la senkompatan impulson
del' nekontenteco
postlasita de tiu sangosuĉanta vampiro
preskaŭ blindiginta min kaj la virgan blankecon de la natur'.

Jelpas mia vundita koro dum petalaj juveloj de fantaste kolorigitaj
perloj stuporas velkante sub la kaprico de l'galopantaj piedglavoj.
Tristas mia deliro serioztenere;
antaŭen, nur antaŭen.

Frenezobstine
mi postsekvas freŝajn spurojn de la demonia potenco
enkadriginta ŝiajn graciojn similaj al pentraĵoj de virgece klasika
madono.

La siluetoj de kvietigaj cipresoj diotime funebras
mian pretecon konkuri kun hurlanta maro
kaj imiti forton de kiklopaj akvofaloj.

La florplene verdaj herbejoj kaj odoro de aminda floraro
miozote riverencas antaŭ ŝia beleco
por ke la furioza volupto
en mia interno kvietiĝu.

Antaŭen, nur antaŭen!

Krias de doloro povra animo mia
dum per la radaro distancas
diamantan ĥaoson de la tremebrila figuro,
nektaran delicon de l'karminaj lipoj
haŭtporojn rozeparfumitajn
sur sensoraj vojoj
ĝis kulmino de l'doloro homa.

En senfundaj abismoj de la nekonscio
perdiĝis
la preĝoj de l'savo,
la ombro de l'teruro kovris
mian koron;
so, sen vi,
la femme fatale,
ekzisti mi ne povas.

Zora Heide

LA SANKTEJO

Bernard Golden

Sur la supro de monteto staras korintik-stila templo rigardanta al granda urbo. La blanka sanktejo estas ĉirkaŭita de densa malluma verdaĵo, kvazaŭ brila perlo en velurtegita juvel-skatolo. Interne de la sankta domo, majeste tronas la patronino Hera. El inerta marmoro la skulptisto kreis belan maturagan figuron dignan esti diino de la virino, zorgantino de la edziga amo kaj la familia bonfarto.

Apud la malgranda konstruaĵo estas ombra bosko kun lignaj kaj ŝtonaj steleoj kaj religiaj skulptaĵoj. Antaŭ la sanktejo videblas pentrinda panoramo. Bunta mozaiko de vitejoj kaj hortoj etendiĝas sur la verda tapiŝo de la malkruta deklivo ĝis la marbordo. Tie la vasta bluverda Mediteraneo renkontiĝas ĉe la horizonto kun la sennuba lazura sud-itala ĉielo.

Ĉe la piedo de la monteto troviĝas la urbo Regiumo* kun sia haveno. Dank'al la bona situo ĉe trafik-riĉa marvojo, Regiumo fariĝis la plej potenca emporio en tiu ĉi parto de Grandhelenujo*. Ĝia komerco kaj kulturo floradis, ĝiaj civitanoj ĝuis prosperon, la naturo malavaris siajn produktojn, kaj paco regis en internaj kaj eksterlandaj rilatoj. Sed ĉio ĉi apartenas al la pasinteco.

Malhelaj nuboj venis makuli la klarbluan ĉielon. Hodiaŭ sur la fasado de la templo reflektiĝas ne la rozaj nuancoj de la subiranta suno, sed la ruĝa flagrado de la incendiita urbo.

Antaŭ dekunu monatoj ekveturis el Sirakuzo milit-floto sub la komando de Dionizio*, unu el la plej ferocaj kaj memfieraj militistoj de la antikveco. Post siaj konkeroj en Sicilio kaj glora triumfo super la kartaganoj, li dediĉis sin al razioj kontraŭ la riĉabundaj italiotaj* komercuroj por akiri rabajon kaj sklavojn. Venkinte Krotonon*, li ordonis, ke liaj eskadroj iru al la okcidenta Kalabrio.

Dum la triremoj trasulkis la Mesinan markolon, la orgojla tirano de Sirakuzo, revante pri la predo atendanta lin en Regiumo, kovis perfidan ruzajon. Partoprenos tiun fiagon ankaŭ la centoj da soldatoj, milit-harditaj hoplitoj, kiuj servas en la armeo de Dionizio: civitanoj de la granda sicilia urbo, dungosoldatoj el Italujo, Gaŭlujo kaj Iberujo, kaj ankaŭ liberigitaj sklavoj, ĉiuj sur siaj apartaj triremoj.

La ŝipoj ankriĝis en la rodo antaŭ la haveno de Regiumo, kaj Dionizio arogante postulis, ke nutraĵo estu provizita por liaj trupoj. Li diris, ke se la civito ne konsentos proviantoj al armeon, li konsideros tion kiel insulton kaj atakos.

Tiu ultimato estigis grandan maltrankvilon ĉe la regiumanoj, ĉar ĝuste tiam, pro malbona rikolto, ne troviĝis en la

urbo troaĵo da greno, kaj mankis ankaŭ aliaj manĝoproduktoj. Oni volis kredi, ke Dionizio, laŭ la kutimo de la helenaj strategoj, intencis restigi sian floton en ankro nur dumvintre, kaj ĉe la alveno de la printempo li daŭrigos sian militiron. Ĝis nun la rilatoj inter la du civitoj ne estis malamikaj, do ne venis en la kapon de la regiumaj magistratanoj, ke estas danĝere havi centojn da batalpretaj soldatoj sidantaj antaŭ la pordego de la urbo dum kvar aŭ kvin monatoj.

Oni do donis ordonon, ke estu starigita vendoplaco ekster la urba murego, kie la ŝipanoj de la floto povas veni aĉeti manĝaĵojn. La magistratanoj esperis ankaŭ, ke restas sufiĉe da talantoj en la monkoj de Dionizio post liaj lastatempaj predakiroj por pagi al la soldatoj la ĉiutagajn tri obolojn por ilia proviant-porcio. Ĉiukaze, ili profitavide devigis la vendistojn altigi la prezojn de tritiko, hordeo kaj oleo por montri al Dionizio, ke estas malavantaĝe restadi tro longe apud Regiumo.

Venis la printempo kaj la triremoj ne malankriĝis. Forpasis la somero kaj ne vidigis iu signon, ke la sirakuza generalo faras preparadojn por lanĉi ekspedicion aliloken. Dume, konsumiĝis la nutraĵo de la regiumanoj. Kiam ili jam konstatis, ke la situacio estas kriza, ĉar sen rimedoj ili neniumaniere povus kontraŭstari al sieĝo, eĉ kelksemajna, estis tro malfrue. La artifikado de Dionizio sukcesis.

Iun aŭtunan tagon ĉe la tagiĝo, kiam la senzorgaj regiumaj soldatoj en la havena fortikaĵo banis sin, knedis panpaston, kuiris matenmanĝon kaj ordigis siajn litojn, la sirakuza armeo subite venis surteren kaj enmarŝis en la urbon. Regiumo devis kapitulaci.

Baldaŭ aŭdiĝis la vekrioj de la enloĝantoj. La viroj estis tuj amasbuĉitaj, kaj la virinoj, infanoj kaj servistoj, nombrantaj pli ol ses mil, forportitaj por esti venditaj kiel sklavoj. Ĉiu domo estis traserĉita, kaj ĝiaj valoraj disrabitaj fare de la predaĵaj soldatoj, kiuj poste, per torĉoj fajrigis la konstruaĵojn.

Antaŭ ol la suno, atinginte la zeniton, forŝrumpigis la ombron de la obelisko sur la dezerta agoro, la tuta urbocentro estis senhomigita. Densa kurteno de fumo kaŝis la stratojn, sur kiuj kulis disternite la nudaj mutilitaj kadavroj de la masakritoj. Ĉie ondis flamoj, kaj ardantaj traboj falantaj en malplenajn ĉambrojn superbruis la ploradon de la mizeraj novvidvinoj kaj orfoj.

De kaŝloko en la bosko apud la templo, Aristono kaj lia edzino Filomela spektis la hororan scenon. Kiam okazis la atako, ili

laboris en vitejo sur la monteto. Forlasante ĉiujn posedaĵojn, ili prenis siajn du infanojn, la suĉbebon kaj la kvarjaran filinon, kaj tuj fuĝis. Kun larmoj en la okuloj ili rigardis al la malsupro de la deklivo, kie alten-saltantaj flamoj voris ilian dometon.

Pluraj taĉmentoj nun disiris el la ruinigita urbo por postsekvi la teruritajn homojn forkurantajn en la arbarojn sur la najbaraj montetoj. La hoplitoj ekmarŝis supren, interligante la manojn por formi longan linion de unu flanko de la monteto al la alia, kvazaŭ grandega vivanta trenreto, fincasante kaj enkaptante ĉion: homojn, brutaron, ĉiuspecajn forporteblajn objektojn. Baldaŭ ili atingos la sanktan boskon, kie atendas la trezoro de la templo.

«Prenu la infanojn kaj kaŝu vin en la ravino aliflanke de la bosko», ordonis Aristono. «Eble tie ni havos ŝancon eviti kapton. Kiam la soldatoj de la malpia Dionizio ekokupiĝos pri la oro kaj arĝento en la templo, ili certe forgesos pri ni ĉi-nokte. La triremoj devos levi ankrojn morgaŭ, ĉar tiu ruza Dionizio ja scias, ke ne restas sufiĉe da provianto en la urbo por la infanterianoj, kaj li estos en eĉ pli granda embaraso, se la remistoj malsatos».

«Kaj kien vi iros?» demandis la edzino.

«En la templon por preĝi. Atendu min. Mi venos poste.»

Filomela prenis la dormantan etulon en siajn brakojn, la knabino kroĉis sin ĉe la kitono de la patrino, kaj ili rapidis en la direkto al la valetoj nun kaŝita inter violkoloraj ombroj post la ĵusa sunsubiro.

«Zorgu, ke la infanoj estu kvietaj», la edzo vokis transŝultre, dum li suprenpaŝis sur la ŝtuparo de la templo. Li tiris la bronzan ringon sur la pordo, kaj unu el la klapoj grince moviĝis. Verŝajne la pastro, urĝe provante eskapi, forgesis ŝlosi la templopordon, aŭ pli probable li sciis, ke estas vane fari tion. Enŝoviĝinte en la naoson, Aristono iris antaŭ la marmoran skulptaĵon kaj kun levitaj manoj komencis preĝi.

Voĉoj de ekstere interrompis lin. Li kuris al la pordo, rapide fermis la klapojn kaj enigis la finaĵojn de la transversa baril-stango en truojn de la pordofostoj. Poste li metis oreton ĉe la pordo kaj provis aŭskulti.

Kelkaj hoplitoj venis kaj haltis antaŭ la ŝtuparo de la templo. Laŭ la voĉoj estis nur triopo. Ili estis ebriaĵaj, kaj la lingvo ne estis la helena. «Italaj soldosoldatoj, kiujn Dionizio antaŭ nelonge varbis en Kampanio», pensis Aristono.

Nun la soldatoj komencis laŭtvoĉe disputi.

«Ni atendu la alvenon de la oficiro», diris unu el la infanterianoj.

«Ne!» respondis la dua. «Li forportos la tutan predajon al tiu fifama Dionizio, kaj restos nenio por ni.»

«Sed vi scias», intervenis la tria, «ke Dionizio ordonis, ke ni ne rajtas reteni rabitaĵojn. Laŭleĝe ĉio apartenas al Sirakuzo».

«Mi fajfas pri la ordonoj de tiu aĉulo», kolere ripostis* la dua soldulo. «Post tiu ĉi kampanjo mi iros hejmen kaj mi volas havi ion en mia burso.»

La aŭdeco ne havas orelojn. Estis decidite, ke la dua soldato eniru la templon por ĉirkaŭrigardi kaj serĉi malgrandajn facile porteblajn valoraĵojn, dum liaj du kunuloj gvatu ekstere por informi lin pri la alveno de aliuloj.

Aŭskultinte tion, Aristono komencis palpi en la peĉnigra mallumo kaj stumblis kontraŭ vazoj, tapiŝoj, skulptaĵoj kaj aliaj votaj objektoj, kiujn la adorantoj de Hera lasis en la templo. Fine, ĉe la muro trafis en lian manon unu el la panoplioj, kiuj estis kolektitaj sur la batalkampoj kiel trofeoj kaj magazenitaj en la templo. Fingrumante kaskojn, ŝildojn kaj kirasojn, li trovis inter ili la serĉatan objekton, longan ambaŭtrancan glavon, iom koroditan, sed kun klingo ankoraŭ sufiĉe akra.

Ekstere la hoplito demetis sian kaskon kaj glavon surteren kaj suprenkuris la ŝtuparon. Aristono aŭdis la pezajn piedpaŝojn sur la ŝtonaj slaboj de la pro-naoso* kaj tuj postenis apud la pordo.

La soldato komencis ambaŭmane tiri kaj puŝi la pordon, sed la stango firme tenis la klapojn fermitaj. Poste, li provis cediĝi la pordon per kalkanum-batoj, denove senrezulte. Fine, uzante sian dikan korpon kiel ramon, li ĵetadis sin kontraŭ la pordon, frapante la bronz-tegitajn tabulojn per sia ŝultro. La pordo knare ŝanceliĝis. Aristono platigis sian korpon kontraŭ la interna muro flanke de la pordo. Post la kvara batego — krak! — la stango ne plu eltenis kaj rompiĝis.

Tra la serena nokta aero la batad-bruoj atingis la orelojn de la fileto de Aristono, kaj li vekigis. Je la unua plorpepo, Filomela ŝtopis la buŝeton de la bebo per sia mammo. Silento. La fratineto tradormis la incidenton.

La hoplito donis unu puŝon, kaj la klapoj de la pordo pivotis internen. La brila lumo de la plenluno inundis la naoson. Aristono levis la glavon super sian kapon, turnis sian vizaĝon al la fono de la naoso kaj mallaŭte alvokis la nomon de la diino.

Siluetiĝante en la porda aperturo, la soldato, apogis sin ĉe unu el la pordofostoj, dum li orientis sin. Poste li transpaŝis la sojlon. Aristono okule mezuris la distancon al la senkaska kapo. La glavo susure disfendis faskojn da lumradioj, aŭdigis obtuza sono, kaj la soldato, trafita surnuke, plumbe falis vizaĝaltere. Pro la skuo, rompiĝis la tenilo de la kaduka armilo en la mano de Aristono. La klingo klaktinte falis sur la ŝtonpavimon antaŭ la piedoj de Hera, elĉiele spektanta la sa-

krilegian dramon de la du teraj mortemuloj.

Aristono rapide retropaŝis kaj ŝvitante, spirhalte, kaŝis sin en la ombroj. Iom post iom ĉesis eĥiĝi tra la naoso la metala sono de la frakasita glavo.

Ekstere la luno banis la tutan montodeklivon en mola arĝenteca lumo. Aŭdiĝis nur la sordina ĉirpado de miriado da insektoj kaj la murmurado de la du soldatoj kuŝantaj surdorse antaŭ la templo. Ili aŭdis nenion kaj nur sencele babiladis pri bagatelaĵoj, apenaŭ konsciaj pri la forpaso de tempo.

Subite aperis du ombroj sur la vojeto kondukanta al la sanktejo. Reagante tuj, la du infanterianoj ekstaris. Unu kuris al la templo por averti sian kunulon. La palgriza fasado kun la larĝe malfermita pordo havis la aspekton de kolosa vizaĝo. El la nigra faŭko etendiĝis ruĝa lango. Alproksimiĝante, la soldato konsterniĝis kaj gapis al la sango-flako sur la slaboj de la pronaoso. Perokule li sekvis la ruĝan fluecon trans la sojlon, kie kuŝis la korpo de la malfeliĉa hoplito. Turnante sin, li descendis de la ŝtuparo per unu salto kaj kuris tien kaj reen kriante, «Li estas morta! Oni mortigis lin! Rigardu!».

La alia soldato tute ne emis konfirmi la novaĵon. Premante sian manon kontraŭ la buŝo de la freneziganta viro, li trentiris lin ĉe la mantelo en la direkto al la bosko. «Rapidu, ili venas. Ni serĉu alian vojon al la haveno.»

La du alvenintoj, viro kaj virino, haltis ĉe la rando de la bosko. La purpura klamido de la viro montris, ke li estas oficiro. Laŭ la mallonga fasono de la kitono de lia akompanantino, oni povis konjekti, ke ŝi estas hetajro aŭ eble simpla putino.

«Mi venigis vin tien ĉi», ŝi diris, fingromontrante al la maro, «por ke vi vidu, kiel plej bele aspektas la marpejzaĝo, kiam la lumo de la plenluno speguliĝas sur la akvosurfaco. Ĉio estas eksterordinare kvietan nun».

La viro, ravita de la sceno, kapjesante flustris, «Jes, ŝajnas, ke la akvo lumineskas». Li ne povis samtempe eviti la vidaĵon de la cindrigita urbo, kie ankoraŭ bruletis konstelacioj da fajretoj, kvazaŭ spegulfildoj de la stelplena ĉiela volbo. Poste, iom senpacience, li ekpaŝis.

«Nu, venu! Mi ne savis vin de la sklavacĉetistoj, nur por ke ni povu promeni en la friska nokta aero. La lito atendas nin. Rigardu la ĉielon. Nur tri horoj restas antaŭ la matenkrepuskiĝo. Dionizio malankros ĉe la tagiĝo hodiaŭ. Espereble tiuj sentaŭgaj italoj jam estas sur mia ŝipo. Venu, ni iru en la templon.»

Brako en brako la paro ascendis sur la ŝtuparo. Vidante la senvivan korpon sur la sojlo, la triremestro bruske flankenŝovis ĝin per sia glavo. La virino sekvis lin,

paŝante piedpinte por eviti la sangomakulojn.

—oOo—

La remist-estro per raŭka voĉo komencis doni la takton por la ritma batado de la remiloj, kaj la rudristoj manovris la triremojn por la marveturo returnen al Sirakuzo. Ekblovis venteto pleniganta la velojn, kaj la peze ŝarĝitaj ŝipoj glitis preter la havenon.

Post longa sendorma nokto la komandanto staris sur la ferdeko de sia triremo, apogante sin ĉe la ĉefmasto. Por la lasta fojo li rigardis la montetojn ankoraŭ kovritajn de frumatena nebulo. Mal-supre kuŝis la pereigita urbo. Pli kaj pli heliĝis la ĉielo, kaj baldaŭ ekaperis la templo-fasado prilumita de la radiantaj ora sundisko.

Interne de la dufoje profanita sanktejo regis profunda silento. Du homoj kuŝis tie, unu sur la malvarma pavimo, kun vizaĝo grimace tordita, la alia sur purpura mantelo, duondorme sonĝanta, kun volupta rideto sur la lipoj.

Paŝante nudpiede sur la roskovrita herbaro de la bosko, Aristono alproksimiĝis al la ankoraŭ ombroplena ravino, kie patrino kaj infanoj, kunpremigante unu ĉe la alia, pace dormis.

—oOo—

Internacia Literatura Konkurso «Tridentum» 1977

1-a premio - Sekcio E: libertema
novelo en Esperanto

Bernard Golden
Hungario

La Sanktejo — Bernad Golden.

Glosoj /vortoj kaj propraj nomoj ne registritaj en *Plena Ilustrita Vortaro*-PIV/.

Dionizio — helena tirano de Sirakuzo /405-367 a.K./.

Grandhelenujo — /latine: *Magna Graecia*/; la antikvaj helenaj kolonioj de la suda parto de la itala duoninsulo.

italioto — loĝanto de la antikvaj helenaj kolonioj en la suda Italujo, t.e. Grandhelenujo.

Krotono — suditala helena havenurbo ĉe la Taranta golfo; /antikve: Crotone; hodiaŭ: Crotone/.

pronaoso — spaco antaŭ la ĉefa parto de antikva templo, ĉirkaŭita de portiko kaj flankmuroj.

Regiumo — suditala helena havenurbo ĉe la Mesina markolo; /antikve: Rhegium; hodiaŭ: Reggio di Calabria/.

riposti — vigle rebati per vortoj.

PRI KAJ ĈIRKAŬ SUFIKSA, PRECIPE LANDNOMA -IO

— Edwin de Kock —

I

Nuntempe, iom laŭmode, disvastiĝas kutimo neglekti la finaĵon *-ujo* ĉe certaj landnomoj, dum kreskas uzado de anstataŭiga *-io*. Ne temas pri vortoj kiel *Aŭstralio*, en kiuj ĝi neniel prezentas sufikson sed nedisigeblan parton de la radiko. Tio ĉi koncernas kunmetaĵojn kiel *Francio*, *Germanio* kaj *Italio*, utiligatajn prefere al la Fundamentaj *Francujo*, *Germanujo* kaj *Italujo*.

Kompreneble ĉi tiajn formojn oni ne elektas senmotive, sed pro la opinio, ke la ŝanĝo estas plibonigo. Tamen ju pli mi ekzamenas la kialojn proponatajn por tiu ĉi *-io*, des pli absolute mi konvinkiga pri ilia malracieco. La reformo — ĉar tia ĝi estas — ne alportas progreson sed nur malsanon, kiu enkondukas fuŝan senordigon en la skematismojn de nia lingvo. Tion mi volas nun demonstri.

Eble la plej forta argumento kontraŭ *-ujo* rilatas al ĝia tiel nomita plursenceco. Ofte oni kredigas, ke la Lingvo Internacia devas nete limigi la signifon de ĉiu sia ero al nur unu, ne rimarkante, ke tio estas idealo neatingebla kaj eĉ rekte kontraŭa al la maniero laŭ kiu funkcias la homa komunikado. Pri *-ujo* oni sekve rezonas, ke ĝi prezentas misaĵon, havante tri signifojn diversajn. Ĉu ĝi ne indikas kaj arbon kaj vazon kaj landon? Sed tiaj pensoj ne taŭgas.

Unue, la praktiko forigis la plej nekontentigan el la uzoj menciitaj, ĉar nuntempe oni jam ne diras *persikujo*, *pomujo* aŭ *pirujo* por plantegoj fruktoportaj, sed ĝenerale nur *persikarbo*, *pomarbo* kaj *pirarbo*. Do restas, efektive, nur du grupoj da kunmetaĵoj per *-ujo*, facile distingeblaj.

Almenaŭ tiel oni povus aserti laŭ klarigomaniero tradicia. Fakte — kaj ĉi tio estas mia dua punkto — *-ujo* per si mem ne sugestas aŭ landon aŭ vazon en maniero specifa. Semantike ĝi iom vastasence egalas nur «kio enhavas». Sekve vorto kiel *Germanujo* devas signifi ion, kio enhavas (ĉefe) Germanojn, kaj *teujo* ion, kio enhavas teon. La nocio pri lando en la unua kazo kaj pri vazeto en la dua devenas el la ĉirkaŭteksto, lige al la bone konata principo de sufiĉo kaj neceso.

Tio ĉi ĝenus nur personojn sen vera kompreno pri la maniero laŭ kiu funkcias kaj kunmetaĵoj kaj vortoj en frazo. Estas tute normala aspekto de lingvoelementoj, ke ili povas porti pli ol unu aŭ eĉ plurajn nuancojn. Tiel evitiĝas tro granda provizo de vortoj kaj radikoj, kiu malebligas la

homan komunikadon per la postulo lerni milionojn da lingveroj, kio tro ŝarĝus la memorkapablon. En la granda universo, kun siaj eblaĵoj vere senfinaj, ne estas praktike havi apartan vorton por ĉiu afero. Feliĉe tio ne necesas, pro la maniero laŭ kiu funkcias la ĉirkaŭteksto: ĝi precizigas la direndaĵojn, eliminante nuancojn malbezonatajn en la koncerna vortigo.

Povas tamen esti, ke — malgraŭ la supra paragrafo — restos ĉe iuj la konvinko pri unike troa plursenceco de *-ujo* kompare kun aliaj afiksoj. Nu, ni vidu. Jen la prefikso *ek-*, kiu indikas kaj komencon kaj momentecon, ideojn sufiĉe malsamajn; aŭ *re-* signifanta *denove* kaj *returne*, diferencaĵojn, se mi ne eraras. Samas inter la sufiksoj. Ekzemple *-ant* estas uzebla ne nur por homo sed iaforte ankaŭ por aĵo, kiel en *dividanto*. Eĉ pli frapas la tiel nomata plursenceco de *-ulo*, kiu — tute paralele kun *-ujo* — povas rilati al tri aferoj. Ĝi ja plej ofte indikas homon (*junulo*), sed iaforte ankaŭ bestoklasojn (*rampulo*) kaj objekton (*triferdekulo*); Krome ne estas ĝuste, kiel asertas Waringhien, ke neniu alia sufikso — escepte de *-ujo* — «prezentas tian kuriozaĵon, ke ĝia memstara uzo respondas nur al unu el la tri» (*Lingvo kaj Vivo*, p. 176). Ĉar tiel same statas ĉe *ulo*, kiu kiel disa vorto aludas nur homon, kaj neniam bestoklasojn aŭ objekton.

Tute alia argumento por la forigo de landnoma *-ujo* estas, ke ĝi ne konsistigas internacian sufikson, facile rekoneblan, ekzemple sur koverto — krom far malmultaj poŝtistoj scipovantaj Esperanton. Nu, tiu rezonaĵo pensigas pri la ideoj de Occidental aŭ Interlingua, projektoj efektive kaŝimperialistaj, Eŭrop-Amerike kaj eĉ blankule orientitaj.

Kial, ĉiukaze, kontraŭi nur unu afikson pro tia internaciemo? Sammotive oni povas postuli eliminon de *-ulo*, *-ilo* aŭ *-ega*. Kaj ĉe tio oni ne bezonas halti. La naturalismo malŝatas ankaŭ la tabelvortojn, kune kun niaj gramatikiloj, por ne paroli pri la deviga akuzativo aŭ la *j-pluralo*, uzata eĉ por formoj akjektivaj.

Cetere mi ne konsideras tion aparte hontiga aŭ eĉ ĝeno skribi kovertadresojn nacilingve, apud eroj en Esperanto, ĝis iam venkos nia idealo. La tago ja iam venos kiam ĉiujn poŝtistojn oni instruos lerneje rekonii, ke *Japanujo* estas lando orientazia, se ili ne kapablas tion fari jam nun — pri kio, parenteze, mi ne estas konvinkita.

Ĉi-rilate alia punkto bezonas atentigon. Tio estas, ke la tempo havas grandan

povon forbalai diversajn ideojn foje ŝajnfortajn. Tial la argumentoj pri la Lingvo Internacia postulas daŭran aktualigon.

Ekzemple, dum la unuaj jaroj oni ofte kritikis la cirkumfleksajn konsonantojn tiel karakterizajn de Esperanto. Oni insistis, ke ili forigendas pro presista maloportunaĵo. Nuntempe, tamen, tia argumento montriĝis absolute eksmoda. Praktike la modernaj Esperantistoj spertas nenium veran problemon aperiĝi siajn eldonadojn, parte tial ke la mono havas tre persvadan voĉon ĉie surtere kaj parte pro la kreo de propraj entreprenoj, sed ankaŭ ĉar okazis grava revolucio teknika, kia estas la foto-presado.

Same eksmodiĝis la naturalismo mem, ĉar efektive ĝi fontas el nura okcidentismo — emo daŭrigi sur la tereno de la spirito la imperiojn jam perditajn en la sfero politika. Por la atomepoko de la nova mondo postmilita ĝi fariĝis, anstataŭ allogaĵo, ĉiam pli granda embaraso. Ĉu ne eble ĝuste al tio ni devus ĉefe atribui la fiaskon de planlingvoj kiel Latino senfleksia, Ido, Occidental, Novial kaj la nuna Interlingua, krom multaj aliaĵoj el la sama skolo?

Eĉ Esperanton mi devis jam persone defendi kontraŭ akuzoj, ke ĝi estas lingvo tro Eŭropa, ekscese naturalisma! Ĉi-rilate mi memoras inter aliaj la reagon de Jan Rabie, afrikansa verkisto, kiu dum konversacio antaŭ pli ol dudek jaroj ŝajnis konsenti pri la neceso por interkomprenigilo sed nemiskompreneble rifuzis la Zamenhofar solvon. Kial? Li ĉefe aludis la homojn de Afriko kaj Azio, por kiuj maltaŭgas troa ligiteco al Eŭropo, kies kateonojn ili volas deskui. Lastatempe mi retrovas la saman reagon eĉ inter la samideanoj, ekzemple en *Oomoto*. Al la akuzo de okcidentismo mi respondas kutime per atentigo pri la neindeŭropaj elementoj en Esperanto, precipe la gramatiksistemo. Samtempe mi malgraŭe konscias pri la naturalismaj troigoj de iuj el niaj aŭtoroj.

La forigon de landnoma *-ujo* oni tamen postulas ankaŭ pro kialo tute alia, nome la Sennacieca influo. Ĉu ne estas strange, ke la homa spirito tiom amas la ekstremeojn? Eĉ pli, dum debato oni ne hezitas uzi argumentojn kiuj devenas el fontoj tute kontraŭaj, kiel la naturalismo kaj la Sennaciismo.

Sendube iuj ideoj de Lanti estas tre pensigaj, kaj la homo iufoje rezonis genie; sed ni Esperantistoj devas alfronti la realon en kiu ni troviĝas efektive, anstataŭ perdi la celon difinitan per devojiĝoj en la regionojn de la revo, kiel ajn alloga. Oni ja ne povas forsupozi la ekziston de la naciismo aŭ de gentoj, nur ĉar tiaĵojn oni ne ŝatus kaj deziras alian mondordon.

Finfine diversaj landoj ja ekzistas, kaj ŝuldas siajn nomojn al la ĉefaj homgrupoj loĝantaj en ili. Estus intelekta malhonestajo ne rekonii la historian kaj aktualan fakton, ke ekzemple *Francujon* pleje posedas la dominantaj francoj, *Germanujon* la

germanoj kaj *Italujon* la italoj. Por prezenti normalaĵon inter la lingvoj de la mondo, Esperanto devas rekonii kaj speguli la politikajn realojn efektivajn, ankaŭ kiel faktoron landnomon. Ĝis eventuale malaperos la naciistatoj, bazataj interalie sur gentismo, devas resti la ekzistantaj etiketoj. La reformemo Sennacieca do estas rifuzenda, same kiel la naturalisma, kvankam pro kaŭzoj iom diferencaj.

La *-ujo* landnoma do tute pravigeblas, kaj neniue el la menciitaj kialoj alportas bonan motivon anstataŭigi ĝin per *-io*. Ĝi ne estas konfuze plursenca, ĝi ne malakceptindas el la vidpunkto de vera internaciismo kaj ĝi ne prezentas falpuŝigilon pro ĝia rilato al la efektiva mondo.

Sed nun ni fokusu la atenton pli sur *-io*, unue rilate al la samaj supraj punktoj, kiujn mi pritraktos denove, kvankam kun perspektivoŝanĝo. Tiel ĝiaj malavantaĝoj kaj la nepra supereco de *-ujo* fariĝos eĉ pli frappe evidentaĵoj.

II

Ni rekomencu per la plej forta argumento kontraŭ la Zamenhofa sufikso, nome ĝia supozita plursenceco. Oni atendus — ĉu ne? — ke ĉi-rilate *-io* montriĝus nepre supera, havante malpli da signifoj ol *-ujo*. Prefere ĝi estu absolute unusenca. Sed kion oni trovas efektive? Multe pli ol *-ujo*, *-io* posedas mirindan, eĉ kaosan plursencecon. Sekvas jene kelkaj el ĝiaj funkcioj:

1. Post la plej diversaj pseŭdosufiksoj grekdevenaj ĝi indikas scienccon, ekzemple:
 - (a) *-grafo* (geografo - geografio)
 - (b) *-metro* (geometro - geometrio)
 - (c) *-nomo* (astronomo - astronomio)
 - (d) *-ologo* (biologo - biologio)
 Laŭ PIV ĝin povas krome antaŭiri tiusence *-krat*, *-mat*, *-pat*, *-tom*, *-urg* kaj *-zof*, kion mi tamen ne pluesploris.
2. Aliflanke ĝi celas malscienccon, kiel en *astrologo* - *astrologio*.
3. Ĝi povas aludi teknikon nomitan laŭ ĝia karakteriza instrumento:
 - mikroskopo* - *mikroskopio*
 - stetoskopo* - *stetoskopio*
 - telefono* - *telefonio*
4. En kelkaj vortoj grekdevenaj ĝi koncernas la politikon, interalie post la jenaj elementoj:
 - (a) *-agogo* (demagogo - demagogio)
 - (b) *-arĥo* (monarĥo - monarĥio)
 - (c) *-krato* (demokrato - demokratio)
5. Ekzistas kazoj en kiuj *-io* diferencigas inter urbo kaj lando, jene:
 - Luksemburgo* - *Luksemburgio*
 - Meksiko* - *Meksikio*
6. Iufoje, tamen, la supra distingo aperas ankaŭ en la formo de mala tipo:
 - Brazilo* (lando) - *Brazilio* (urbo)

7. Alia diferencigo estas inter lando kaj la rivernomo el kiu ĝi devenas:
Niĝero - Niĝerio
8. Kvara speco de landnomoj, pli ol 30 laŭ Montagu C. Butler (*Esperanto-English Dictionary*), simile sed ne same finiĝas per *-io*, kiu tamen ne estas sufikso. La vortoj pri kiuj temas ne povas disiĝi en radikon plus finaĵo, kaj ilin oni ankaŭ kreas el radikoj nomantaj popolanojn. Ekzemple, loĝanto de *Cilio* ne estas *ĉilo* sed *ĉiliano*, kontraste kun *hispano* troviĝanta en *Hispanujo*. Ĝuste por ne konflikti kun tiu ĉi nesufiksa tipo de landnomoj, *-io* ne devas fariĝi alternativo aŭ anstataŭigo por *-ujo*. Se ni akceptus, apud vorto kiel *Hispanujo*, ankaŭ *Hispanio*, ni perdus klaran kaj necesan distingilon. La Esperantistoj jam ne sciis, ĉu enloĝas la du landojn supre menciitajn *ĉiloj* kaj *hispanoj* aŭ *ĉilianoj* kaj *hispanianoj*. Sed ĉu la problemo ne solviĝus per konsekvenca aplikado de nur la lasta vortotipo, la pli longa? Ne, ĉar malhelpas almenaŭ du fortaj faktoroj. Unue, la Fundamentajn vortojn, kia estas *hispano*, neniuj rajtas forigi aŭ malhelpi kaj ĉiuj povas daŭre uzadi. Due, ja ekzistas *hispanoj*. Lige al tio estus stranga nekonsekvencaĵo konservi formon kiel *Hispanio*, klare faritan el *hispano*, dum ĉi tiun oni forjetas. Kompreneble eblas eĉ konstrui formon kiel *Hispanujano*, por indiki *kataluno* aŭ *vasko*. Tio estas eĉ rekomendinda. Tamen, ankaŭ ĉi-rilate afiksa *-io* ne montriĝas utila, ĉar ilo de konfuzo.
9. Sed eĉ inter la tabelvortoj ĝi iusence aperas, kiel la nedifina pronomo *io*! Memorendas, ke efektive *-io* finaĵa same kreiĝas el *-i* + *-o*, kvankam kun aliaj funkcioj. La sona koincido tamen estas faktoro neignorebla.
10. Teorie *-io* povas konflikti ankaŭ kun la infinitiva *-i*. Ne maleblas, ke en la estonta evoluo de la lingvo oni iam ekhavas bezonon aŭ deziron krei el verboj formojn kiel *dormio*, *laborio*, k.t.p., por speciala nuanco ne tute ebla per *dormo* kaj *laboro* aŭ *dormado* kaj *laborado*.

Jen repertuaro — verŝajne nekompleta — de dek malsamaj variantoj de *-io*, krom la uzo laŭ kiu ĝi anstataŭas *-ujo*, pri kies tri nuancoj oni plendis! Do, evidente, *-io* ne montriĝas supera pro supozita pliklareco surbaze de ia unusignifeco. Apud la Zamenhofa klaro kaj prudento ĝi kreas impreson de lingva dekadenco.

Ni ankaŭ rekonsideru la kromargumenton, ke la memstara uzo de *-ujo* respondas al nur unu el ĝiaj sencoj. Kion signifas la disa vorteto *io*? Ĉu eble ĉiujn dek aferojn menciitajn supre? Tamen ne. Ĝi korespondas nur al la tabelvorta pronomo nedifina.

Sed ĉi-kaze ekzistas ankaŭ alia problemo, iom grava el vidpunkto principa. Pro la ecoj de Esperanto mem, niajn sufiksojn oni povas uzi kiel vortojn, post aldonado de la koncernaj gramatikiloj. Kiel montris Claude Piron (*Esperanto: ĉu Eŭropa aŭ Azia Lingvo?*) tiu faktoro determinas inter aliaĵoj la izolan karakteron de la Zamenhofa sistemo. Nu, finaĵa *-io* (disde la tabelvorta, kiu ne estas sufikso) konsistigas kuriozan fenomenon en Esperanto, ĉar ĝi tute ne povas fariĝi vorto memstara! Ĝi prezentas, efektive, prunton el la hindeŭropa fleksiismo, tute fremda al nia lingvo, en kiu ĝi do ne meritas ekzistorajton. Tiu ĉi estas peza argumento kontraŭ *-io* kiel sufikso, kaj ne nur rilate la landnomojn kreatajn el popolindikaj Fundamentaĵoj kiel *franco*, *germano* aŭ *italo*.

Sed kio pri la dua ĉefargumento, ke ĝi estas akceptinda — pli ol *-ujo* — pro sia internacieco? Denove mi atentigas pri la jam menciita handikapo de la naturalismo, al kiu fariĝas alergiaz ĉiam pli da homoj, precipe kvankam ne nur la eksterekcidentuloj. Jam vanas fanfaroni pri *-io*, aludante similecon kun la Mediteraneaj lingvoj, kio povas nur ĉagreni aŭ oscedigi.

Tiu ĉi «internacieco» havas la grandegan malavantaĝon, ke ĝi paŭzas la neregulaĵojn hindeŭropajn. Precize por eviti tion Zamenhof kreis sian sistemon unikan. Se li ne povis tute eviti iujn landnomojn finiĝantajn per *-io*, li limigis ilin al formoj kiel *Aŭstralio*, sed li ne prezentis tion kiel sufikson. Por finaĵo li kontraŭe inventis *-ujo*, solvon ĉiel bonan kaj uzandan.

Restas, fine, la argumento Sennacieca, kiu mise disvastiĝis eĉ en cirkloj ideologie malproksimaj de la Lantia pensmaniero. Ni rigardu tion denove, demandante ĉu formoj kiel *Francio*, *Germanio* kaj *Italio* efektive solvas la problemon kiu por iuj homoj ekzistas ĉe *Francujo*, *Germanujo* kaj *Italujo*.

La respondo estas, ke ne. Same kiel la Zamenhofa kunmetaĵoj, la unue menciitajn oni faris el la radikoj gentindikaj. Finfine, ankaŭ *Francio* devenas el *Francio*, *Germanio* el *Germano* kaj *Italio* el *Italo*, ĉu ne? Waringhien jam parte atentigis pri la nekonsekveneco de la Sennacieca Asocio, prave asertante, ke ties membroj «devus ankaŭ rifuzi la gentnomojn, kaj paroli nur pri francianoj, germanianoj, ktp.» (*Lingvo kaj vivo*, p. 186).

Nu jes, sed la argumento povas konduki eĉ pli malproksimen. Por esti plene konsekvencaj, la Sennaciistoj devus rifuzi ĉiujn landnomojn enhavantajn ian ajn aludon al popolo aŭ gento, pro ties naciismo efektiva aŭ potenciala, kreante formojn tute novecajn. Do ilian dilemon ne forigas vortoj kiel *Francio*, *Germanio* aŭ *Italio*.

Mi jam montris, ke ankaŭ la Fundamentaj kunmetaĵoj povas ĉiukaze, per pluformado, liveri iom malpli naciismajn vortojn — laŭ la aludita pensmaniero. Tute eblas formoj kiel *francujano*, k.c., kiuj

havas la potencialon de utila nuancigo, se uzata apud *franco*, k.c., por indiki homojn vivantaj en koncerna lando, sed kies gento diferencas de tiu al kiu la ŝtato ŝuldasian nomon. Sed ofte tiuj formoj longspiraj havas nenian funkcion.

Komparo inter *-ujo* kaj anstataŭiga *-io* landnoma do klare montras la superecon de la Zamenhofa sufikso. Al la konstatoj de la antaŭa parto aldoniĝas en ĉi tiu la malkovro pri gravaj mankoj ĉe *-io*. Kiel sufikso ĝi estas malpreciza pro troaj signifoj kaj uzoj. Krome tio konfuzas la jaman sistemon pri landnomoj, kaj prezentas — kiel ero fleksia — atencon kontraŭ la izola karaktero de Esperanto, konsistigante nenian avantaĝon el vidpunkto vere internacia aŭ eĉ Sennacia.

Tial oni devas pluuzadi la Zamenhofan *-ujo* por la koncernaj landnomoj kaj rifuzi la laŭmodiĝantan *-io* anstataŭigan, kiu alportas malsanon en la lingvon. Tiu medicina metaforo certe memorigos pri la du ismoj rilate al *kia* kaj *tiom-kiom* bonege esploritaj far H. A. de Hoog (*Du Malsanoj en Esperanto*). Nu, temas pri afero eble eĉ pli serioza.

III

El la supra diskuto evidentiĝas pli ol konstato pri landnomoj. Devas esti klare, ke Esperanto bezonas, krome, pli severan iimigon de *-io* ankaŭ en ĝiaj ceteraj funkcioj.

Ekzemple, ĝi ne montriĝas kontentiga por indiki sciencon, pro almenaŭ du kialoj. Unue, ĝi estas malpreciza, havante — kiel mi demonstris — tro multajn uzojn. Due, ĝi tro forte ligiĝas al pseŭdosufiksoj, kiel *-grafo*, *-metro*, *-nomo* kaj *-ologo*, por mencii nur iujn. Ĉi lastaj prezentas neelegantan embarason de riĉeco, maltaŭgan en simpla, konsekvenca lingvo kiel la nia. Sed *-io* ne estas disigebla de tiaj formoj, pro kaŭzoj etimologiaj. Tial vanas pledi por hibridaĵoj kiel *birdologio* anstataŭ *ornitologio*, ĉar samprave oni povas diri *birdografio*, *birdometrio* kaj *birdonomio*.

Multrilate mi konsentas kun Petro Stojan (*Deveno kaj Vivo de la Lingvo Esperanto*) kaj Karolo Piĉ, kies multajn revuartikolojn mi lastatempe legis kun granda ŝato: rifuzendas la modo tro senpripense enkondukadi amasegon da neologismoj, ankaŭ sciencaj. Ofte ili prezentas nenian riĉigon por nia lingvo, dum ili kreas multajn problemojn, interalie reagon de la neokcidentanoj. Kial, ekzemple, ni devas havi apud *televideo* ankaŭ la vorton *televizio*? Ifoje ja ekzistas vera bezono alpreni plusajn radikojn. Tion neniu volus nei, krom ekstremaj konservativuloj. Sed la preferinda metodo restas utiligi, se eble, la skematismajn eblaĵojn de Esperanto.

Kun Stojan kaj Piĉ mi ankaŭ konsentas pri la neceso por pliaj afiksoj saĝe elekto-

taj, ĉar unu tia ekstra elemento povas malnecesigi la enkondukadon de centoj da radikoj tro ŝargantaj la memoron. Efektive, la fakto ke oni opinias bezonataj tiom da neologismoj jam per mi mem konsistigas iasence pruvon pri troa magreco de la lingvo rilate la afiksaron.

Sed kun Stojan kaj Piĉ mi ne konsentas pri la solvo kiun ili ŝajne proponas: akcepti kaj disvastigi pseŭdoafiksojn, ekzemple *-io* kiel en *-ologio*. Ne, tio estus terura mispaŝo, kaŭzanta problemojn tre konfuzajn, interalie la kreon de tro multe da homonimoj, kiuj — ĉe ekscesiĝo — povas malfortigi la koherecon de lingvosistemo. La plej bona tipo de afikso, aŭ ero uzebla kiel tia, prefere ne estu identa kun vortoparto malliga. Guste tial ekzemple *kontraŭ* montriĝas, pro la fina *-aŭ* ifoje kritikita, multe pli bona ol *kontra*, ĉar ĝi ne povas veki ĉe iuj misan emon malkomponi formojn kiel *kontrabando* aŭ *kontrapunkto*, kio minacas iliajn stabilecon kaj pluekziston. Similkaŭze rifuzindas pliampleksiĝo de *anti-* kaj aliaj tiaĵoj. Ĉiam estas memorende, ke pseŭdoafiksoj ne prezentas vivajn vortfarilojn en Esperanto sed nedisigeblajn partojn de radikoj.

Por malpliigi la troajn neologismojn la ĝusta vojo estas elpensi kaj aplikadi pli netajn alternativojn paralele kun la fremdaj pruntaĵoj, ifoje jam profunde — eĉ se malmerite — enradikiĝintaj. Por tio oni devas kaj kree eluzadi la jam ekzistantajn eblaĵojn de la Zamenhofa sistemo kaj saĝe enkonduki kelkajn novajn, inkluzive afiksojn. Ĉi lastaj devas tamen eviti konfuzeblon per diferenco disde la pseŭdoafiksoj. Tial, parenteze, mi ne povas akcepti *-al*, kiun Piĉ nun uzas kaj propagandas diversrevue.

Nepre rifuzindas la malprecizaj kaj ankaŭ tro longaj *-ologo* kaj *-ologio*, pro kialoj jam aluditaj. La skematisma metodo estus elekti tute novan sufikson, klaran, nemiskompreneblan kaj mallongan, ekzemple *-og-*, al kiu povas aldoniĝi aliaj finaĵoj, kiel *-isto*. Se superaj, la rezultaj formoj laŭgrade, evolue sed neniel disrompe anstataŭus centojn da grekismoj, jene:

birdogo - *birdogisto* anstataŭ *ornitologio* - *ornitologo*

stelogo - *stelogisto* anstataŭ *astronomio* - *astronomo*

terogo - *terogisto* anstataŭ *geografo* - *geografio*, k.t.p.

Kion oni evitu, tio estas kunmetaĵoj longegaj kaj sekve mallertaj. Certe vorto kiel *birdogo* prezentas silabosparon de 50 % kaj tre superas *ornitologio* ankaŭ tiurilate, krom la pli granda precizeco de *-ogo*, kies specifa funkcio forte kontrastas kun la *-io* malekzakta.

Sed povas esti, ke por tiuj tia solvo estos tro simpla. Ekzistas sciencistoj kiuj amas la naturalismon. Troviĝas aliaj kun prefero por vortoj nekompreneblaj al la

laika ordinarulo. Pri la unua inklino mi ne parolos plu. La dua tipo de homo devas serioze demandi sin, ĉu la sopiro uzi gravsonajn, arkanajn terminojn vere ĉiam necesas por la koncernaj disciplinoj. Mi ne povas eskapi la suspekton, ke parto de la motivo identas kun orgojla, mezepokeca deziro imponi la vulgaran publikon, kiu sendube iam diradis: «Tion ni ja ne komprenas, ĉar ĝi estas en latino, sed tio nur pravas, ke la parolanto scias pri kiu temas kaj multe pli inteligentas ol ni!».

Esperanto ĉiel celu pli da demokrateco ankaŭ kaj precipe sur la tereno de la sciencoj, kiuj ne fariĝu nova misterkulto kun kaŝformuloj kaj pastraro. Bona paŝo en tiu direkto estus nova klopodo elpensi kaj ekuzi netajn vortojn kunmetitajn antaŭ ĉiam pli kaj tro da neologismoj, kiuj cetere ofte alportas mallertaĵojn, se oni ekzamenas ilin kritike. De tiu eksceso -io ŝajnas al mi elstara simptomo.

Feliĉe kaj tre kuraĝige, laŭ diversaj indikajoj en nia revuaro, nuntempe vekigas pli kaj pli forta deziro reekiri la vojon de la skematismo. Venas reago kontraŭ la modo de troa neologismemo, kiu laste furoris inter ni. Tio konsistigas bonan pruvon pri la saneco de nia kulturo, ĉar ja ekzistas granda bezono reĝustigi la perditan ekvilibron inter formoj propraj kaj la neologismoj. Eble ni troviĝas en nova stadio de la Esperanta lingvovolvuo.

Edwin de Kock
Respubliko de Sud-Afriko

Horizonto estas la sola sendependa periodaĵo, kiu profunde analizis la novan statutprojekton de UEA. Diskonigu tiujn gravajn artikolojn.

PRI LA STRATNOMOJ DE BJALISTOKO

N. Z. Maimon en sia interesa traduko de la elĉerpajo el la aŭtobiografio de Ossip Dymov, aldonis ankaŭ rimarkojn: «Ĉiuj stratoj de la juda urboparto estis alinomitaj post la dua mondmilito. Nur «Lipowa» konservis sian originalan nomon. «Ulica Zydzowska» aŭ «Jatke-Gas» ŝanĝiĝis jam en 1919 al «Zamenhof».

Kiel eksbjalistokano, kiu naskiĝis tie kaj tie vivis ĝis 1929 mi volus rimarkigi ke:

- 1) Verŝajne N. Z. M. intencis diri: *post la unua mondmilito* ĉar post la dua mondmilito preskaŭ ne restis plu la juda urboparto ĉar la germanoj forbruligis kaj ruinigis ĝin post la ribelo en la gheto tie.
- 2) La judoj, kiuj ĝis la mezo de la dua mondmilito, nombris ĉ. 60.000 da loĝantoj, ankaŭ post kiam la stratoj ricevis oficialajn nomojn, ilin nomis laŭ filiaj judaj nomoj, ekz. «Kilinskiego» - «Dajĉiŝe gas» (Deutsche - germana str.) - «Legjonowa» - «Senders gas» - «Nadrzeczna» - «Bod gas» - Wylcza» - «Ĥajej Odom gas» - «Katuszynska» - «Jeŝive gas», k.t.p.
- 3) Antaŭ la «Jatke gas» ricevis la nomon: «Zamenhofa» ĝi nomiĝis «Zielona» kaj «Zydzowska» estis alia str. paralela al «Rynek Koŝciuszki» (inter Sienkiewicza kaj Kupiecka).
- 4) La strato «Lipowa» dum la germana okupado 1915-1918 estis nomita: «Lindan strasse». Poste ĝi ricevis la nomon: «Pilsudskiego».

J. Giladi (Kfar Saba)
Israelo

LA INGENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA

Tiu ĉi grava verko aperis en eldono «Fundación Esperanto» de Hispana Esperanto-Federacio (Eldona Fako) Zaragoza. 820 paĝoj, formato 17,5 × 25 cm, ilustrita, bindita. Prezo: 2.500 pesetoj plus 10 % por sendokostoj.

Havebla ĉe F. E. Sekr. Inés Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza-1, Hispanujo, aŭ ĉe via libroservo.

28 PERSEKUTO DE ESPERANTISTOJ EN ĈEĤOSLOVAKIO

28.1 *Kriminaljura proceso.* — En ero 22 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto*, n-ro 6/78) ni koncize informis pri pliaj persekutoj de esperantistoj en Ĉeĥoslovakio, en kiuj, bedaŭrinde, partoprenis ankaŭ funkciuloj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, «aliĝinta asocio» de UEA. Ampleksa dokumento kun multe pli da detaloj pri faktoj kaj juraj analizoj estis senditaj al IKUE, KELI, Radio Vatikana, sekretario de IEAJ, la CO de UEA por la Estraro de tiu asocio kun la instigo interveni cele al ĉesigo de la persekutoj kontraŭ M. Sváček kaj pastro V. Srna, la du ĉefaj viktimoj. Ankaŭ Amnestio Internacia, objekte informita per anglalingva traduko de la dokumento pri tiu kontraŭleĝa malrespekto de unu el la gravaj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, decidis agi. En sia letero de la 17-a de novembro 1978 ĝia Internacia Sekretariato dankis pro la dokumento kaj daŭrigis:

«Via jura analizo havas apartan intereson por ni. Post nia telefona konversacio mi sendis la informon al ĉiuj Kunordigaj Grupoj pri Orienta Eŭropo kaj petis ilin havigi ĝin al la gazetaro kaj aliaj komunikiloj, kiel ankaŭ al la eklezioj. Mi informis ankaŭ D-ron Perko pri tiu ĉi agado.»

Efektive, dank' al agado de Amnestio Internacia kaj de kelkaj aktivuloj en la partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado, pluraj informoj pri la afero aperis en la gazetaro de diversaj landoj, interalie en la tre gravaj *Frankfurter Allgemeine Zeitung* (FRG), *Politiken* (Danlando), *La Nazione*, *L'Avvenire* (ambaŭ Italo) kaj *La Vanguardia* (Hispanio).

Tiuj agadoj, inspiritaj de humanecaj motivoj kaj tute konformaj al la klaŭzo pri la respekto de la homaj rajtoj laŭ art. 4 de la Statuto de UEA, vaste diskonigis inter la esperantistaro de Ĉeĥoslovakio kaj ricevis fortan aprobon. Kompreneble, pri ili sciiĝis ankaŭ la tieaj aŭtoritatoj. Per letero de la 8-a de februaro 1979 M. Sváček esprimis «koreĝan dankon pro ĉio farita» kaj informis, ke la kriminaljura proceso kontraŭ li mem kaj Srna okazos la 22-an de februaro. Samtempe li sukcesis sendi la kompletan tekston de la akuzo de la Distrikta Prokuroro en Ustí nad Orlicí de 15.01.1979, n-ro Pv 8/79 IT 29/7. La akuzo estas esence identa al la jam prezentita en la ero 22, menciita enkonduke. M. Sváček aldonis: «Mi informos vin pri la rezulto de la proceso, aŭ tion faros iu alia, se mi ne povos».

28.2 *Rezolucio de la Estraro de UEA.* — Bedaŭrinde, la Estraro de UEA decidis ne entrepreni ion ajn por helpi la du esperantistojn, kontraŭjure persekutatajn. Laŭ la letero de la prezidanto de UEA de 20.02.1979 al la redaktoro de tiu ĉi rubriko, la Estraro de la Asocio pritraktis la aferon la 13-an de januaro kaj unuanime akceptis Rezolucion, en kiu ĝi «notis la problemojn, kiuj ekestis kunlige kun la Libertempa Esperanto-Tendaro, Herbotice, Ĉeĥoslovakio, en julio 1977». Espereble, la revuo *Esperanto* publikigos almenaŭ tiun sensignifan, fakte ege signifan nur pro sia sensignifeco, pure abstraktan Rezolucion de sia propra Estraro, en kiu troviĝas eĉ ne aludo pri la persekutado de la esperantistoj Sváček kaj Srna, ankoraŭ malpli pri la kontraŭleĝeco de tiu persekutado, en kiu aktive partoprenis la funkciuloj de CEA, «aliĝinta asocio» de UEA, eĉ komitatano de UEA, kaj pri la hontinda eksigo de Sváček el CEA, do ankaŭ el UEA. En la Rezolucio la Estraro de UEA fuĝas de sia laŭstatuta tasko, kiam ĝi asertas, ke «juraj paŝoj kontraŭ esperantistoj pro aliaj kaŭzoj (t.e. ne tial, ĉar ili parolas Esperanton, *nia rim.*), eĉ se tiuj paŝoj okazas en la kunteksto de Esperanto-arango, estas ekster la mandato de la Asocio». Kompreneble, fakte estus «ekster la mandato de la Asocio», se iu Esperanto-parolanto estus persekutata pro ŝtelo, murdo aŭ kiu ajn alia krimo. Sed en la kazo Sváček-Srna tute ne temas pri krimo, sed pri realigo, lige kun elstara Esperanto-agado, de unu el la fundamentaj homaj rajtoj, rekonita ne nur en internacia juro, sed ankaŭ laŭ la juro de Ĉeĥoslovakio, ĉar ĝi ratifikis ambaŭ paktojn pri la homaj rajtoj, kiuj tiamaniere fariĝis integra parto de la interna juro de tiu lando. Sekve, se art. 4 de la Statuto de UEA ankoraŭ havas ian sencon, UEA devis energie interveni, des pli ke Sváček (eble ankaŭ Srna) estis AM de UEA ĝis la momento, kiam li estis kontraŭjure kaj kontraŭstatute ekstigita el CEA, do ankaŭ el UEA, pro nenio alia ol pro realigo, en ege diskreta formo, de sia rekonita homa rajto.

En ligo kun tiu historia Rezolucio — kaj la vorto «historia» tute ne estas uzita en ironia senco — oni povus starigi al la Estraro de UEA tutan aron da demandoj, ekzemple ĉu la pogromoj kontraŭ judoj, pri kio kun indigno parolis D-ro Zamenhof; aŭ la murdo de la familio Zamenhof inter milionoj da aliaj fare de la nazioj; aŭ la murdoj kaj persekutoj de «socie fremdaj elementoj» dum la purigoj de Stalin, ktp., estus same tiel «ekster la mandato de la Asocio». Sed ni rezignas pri tio, almenaŭ en la nuna momento.

28.3 *Kion nun opinias D-ro U. Lins?* — Tamen, estus interese scii ĉu almenaŭ D-ro U. Lins, kiu siatempe dum pluraj jaroj efike kunlaboris kun la redaktoro de tiu ĉi rubriko, precipe je la verko *Esperanto en Perspektivo* (EeP), juĝas la nunan gvidantaron de UEA laŭ la samaj korektaj kriterioj, kiujn li aplikis en ĉap. 14.3.4 rilate la antaŭmilitan

«krison kaj degeneron de UEA» pro ĝia kliniĝo antaŭ hitlerismo, aŭ en ĉap. 21.3.1 rilate la «moralan descendon» de la Germana Esperanto-Asocio pro ĝia sensukcesa provo submetiĝi al naci-socialismo. Kompreneble, estas ĉiam pli facile kritike analizadi kaj kondamni pasintajn erarajn sintenojn al subpremantoj, precipe post la malapero de tiuj subpremantoj, ol bone orientiĝi kaj preni korektan pozicion rilate la aktualajn eventojn. Tamen, oni povas atendi, ke talenta persono, kiel U. Lins, kapablas fari sukcesajn paralelojn inter la sinteno de la nuna gvidantaro de UEA kaj la situacio en la periodo de la «nevenkebla hitlerismo», kiun li tiel trafas analizis en *Esperanto en Perspektivo* (v. precipe p-ojn 435-444 kaj 702-706). Tiu ĉi rubriko estas malfermita por lia eventuala reago je tiu ĉi interesa demando. Tiu ĉi ero rilatas al ĉap. 21 de *EeP*.

29 ESPERANTO EN BIBLIOTEKOJ

En 1978 aperis stencillite broŝuro de Marinko Givoje sub la titolo «Manlibro pri Esperanto en Bibliotekoj». Kiel la aŭtoro mem informas en enkondukita noto, temas nur pri bazo de manuskripto, aperonta poste en presita formo. La aŭtoro intencas vastigi kaj kompletigi tiun ĉi gravan verketon de 33 grandformataj paĝoj. Eĉ en tia nekompleta formo la broŝuro prezentas tre valoran materialon pri Esperanto en publikaj kaj en grandaj privataj bibliotekoj. Por ĉiuj informoj kaj eventualaj mendoj oni bv. sin turni al la adreso de la aŭtoro: M. Givoje, Pp. 5025, YU-41040 Zagreb-Dubrava, Jugoslavio.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 3.2.5 kaj aliajn erojn rilatantajn al bibliotekoj en *EeP*. Vidu ankaŭ la artikolon pri la Hispana Esperanto-Muzeo en tiu ĉi n-ro de *Horizonto*.

Hamburgo en Retrospektivo, la plej cenzurita verko en la historio de la Esperanto-Movado, tabua por la timantoj de la vero, rivelas por sinceraj esperantistoj, kaŝe cirkulanta kaj aŭde legata sub totalecaj reĝimoj. (V. la anoncon sur la lasta kovrilpaĝo).

TRA LA ESPERANTO-GAZETARO

En HUNGARA FERVOJISTA MONDO (n.º 3 - jul.-sep.-78) enestas interesa raporto pri «Internacia Interlingvistika Konferenco en Budapeŝto», kiu okazis de la 24-a ĝis la 28-a de julio 1978 en la Internacia Studprepara Instituto de Budapeŝto. La sekvanta konferenco estas antaŭvidita en Venecio (Italio): observinda afero!

En OOMOTO (jul.-dec.-78) ankaŭ aparte interesa aperas raporto de Joŝimi Umeda pri «*Esperanto en la Giganta Lando Ĉinio*», raporto pri vojaĝo de japanaj esperantistoj en Ĉinio.

Enestas ankaŭ la fino de artikolo de Karolo Piĉ pri «*Periferiaj ĝenroj en Esperanto*» kun glosaro de la redaktoro pro jenaj neologismoj: «*ab = disde - aplane = senplane - jarmarkto = ĉiujara gradfoiro - rehabiliti = reinstali - ktp.*». Notinde, ke tiaj neologismoj estas enkondukitaj de ĉefo, kaj oni ne plu parolu pri «*okcidentigo de Esperanto*» fare de okcidentaj eŭropanoj!!!

En la sama revuo ankaŭ celtrafa studo de Bernard Golden pri «*Esperanto kaj Eŭropaj Kutimoj: la problemoj de virinaj titoloj*», per kiu artikolo li montras, ke «*eble estus pli bone ne tuŝi la tradiciajn kutimojn en Esperantujo... tiel fuŝa kaj kaosa*» estas la internaciskala situacio: prava respondo al la artikolo de Akiko Woessink-Nagata aperinta en ESPERANTO (majo 1976, n.º 845).

En PERSPEKTIVO (n.º 7 - marto 1979) Peter Zacho draŝe priparolas la projekton de H. Tonkin pri la statuto de UEA. «*Tre certe Statuto intermite bezonas revizion. Ankaŭ la nuna de UEA. Sed revizii la Statuton tiel, ke ĝi leĝigas la nunan kontraŭ-neŭtralecan agadon de UEA, ĝuste tio signifas moki Zamenhof, Hodler, Lapenna kaj ĉiujn sincerajn kaj honestajn esperantistojn...*

Tonkin tre ruze manipulas per la vortoj. Li miksa la vortojn de prof. Lapenna kun siaj propraj. Leginte ilin, certe ĉiuj, kiuj ne legis «HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO» aprobas la vortojn, kiuj tamen samas al interpretado fare de la Diabolo pri la Sanktaj Skriboj. Temas pri la par. 4 (en la nova projekto par. 5) kaj par. 13 pri la neŭtraleco. La nuna par. 4 tekstas jene: «UEA estas neŭtrala rilate al... kaj sociaj problemoj». Par. 5 en la projekto tekstas: «UEA estas neŭtrala al... kaj tiuj sociaj kaj politikaj problemoj, kiuj ne estas lingvaj».

Laŭ prof. Lapenna, kaj ŝajne ankaŭ laŭ d-ro Tonkin, tiu «neŭtrala al sociaj problemoj» estas tute maltaŭga. Sed Tonkin ne volas forigi ĝin. La nova teksto: «neŭtrala al tiuj sociaj kaj politikaj problemoj, kiuj ne estas lingvaj» tre bone konformas al la ideologio de Tonkin. Ne lingvaj! La problemoj de niaj orienteŭropaj esperantistoj ĝuste ne estas lingvaj. Ili estas organizaj kaj precipe - homaj...

Ni tre bone komprenas, ke Tonkin ne deziras defendi tiujn esperantistojn. Li elektas, obeante al la politikaj puĉistoj, kiuj faris lin «prezidanto», konduki ilin en orienteŭropajn gulagojn (laŭ d-ro Salan). Ĝis tia ekstrema absurdo venis la nuna UEA. Por Tonkin ne gravas, ĉu senkulpaj esperantistoj perdas sian laboron, devige eksgeedziĝas, estas arestataj kaj - kio poste?...

Se la statutprojekto realiĝos, estos katastrofo por la tuta esperantismo. Ni memoru, ke la orienteŭropaj landoj havas pli ol 14.000 voĉojn, ĉiujn por la nova statuto, ĉar neniu rajtas voĉdoni kontraŭ, kvankam verŝajne almenaŭ 12.000 tion dezirus. Kaj tamen UEA ornamas sin per la epitetoj «demokrata» kaj «neŭtrala». La realiĝo de la statutprojekto estos la «dua Hamburgo». La tria okazos tuj poste, nome kiam Sovet-Unio aliĝos al UEA. Kiam tio okazos, oni verŝajne ne plu bezonos apogon de la «kunvojaĝantoj» nek de la troambiciuloj kaj enviuloj nek de Tonkin, kiu tiam «demokratece» lasos la prezidantan seĝon al iu alia - post kiam ili ĉiuj faris «sian» laboron.

Sen plia komento!

Tamen el la Federacio «MIDI-PYRENEES» de UNIO FRANCA POR ESPERANTO venis jena rezolucio: La Federacio «Midi-Pyrénées», kunveninta en ĝenerala asembleo la 4-an de marto en Verniolles, petas de la Kongreso 1979 de U.F.E., ke estu konsiderata la problemo de neŭtraleco en rilato kun la projekto de nova statuto ĉe U.E.A.

La neŭtraleco estas vivograva faktoro por la funkciado de niaj organizoj. La neŭtraleco estas en rekta linio de la tradicio ekde Zamenhof ĝis hodiaŭ. Konsekvence la Komitatanoj A kiuj reprezentas U.F.E. ĉe U.E.A. devus esti instrukciitaj de la Kongreso de UFE en LILLE oponi al modifo de la kvar artikoloj 4, 13, 16 kaj 21, kiuj koncernas la neŭtralecon en la Statutoj de UEA.

J. T.



“Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo.”

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

«*Le Général et l'Anti-Babel*» (La Generalo kaj la Anti-Babelo) — Sub tiu titolo la fama franclingva kolekto de popularaj spionaj romanoj, «*fleuve noir*» (nigra riverego), ĵus publikigis de la verkisto Pierre Nemours nekutiman rakonton pri spionaventuro, kiu disvolviĝas okaze de Esperanto-kongreso en Varna (Bulgario).

La romano estas esperantlingve dediĉita: «Al mia amiko André Bourdeaux kaj al ĉiuj esperantistoj». Kaj ekde la 9-a paĝo «*AVERTO*» atentigas la legontojn:

«En la esperantistaj medioj por neniu estas sekreto, ke la landoj de l' Oriento entreprenis certigi al si la regadon de la Monda Movado.

Estas fakto, ke la monda Esperanto-kongreso de 1978 okazis en Varna sur la bulgara bordo de la Nigra Maro.

Ce tio dirita, ĉi tiu romano estas verko de nura fikcio, kaj se renkontigos, ke personoj aŭ situacioj respondas al la realaĵo, tio estas nura — kaj bedaŭrinda — koincido.»

Fakte temas pri tre alloga misio de du ne malpli allogaj agentoj de l' Sekreta

Servo estrita de la (jam fame konataj pro aliaj samseriaj romanoj) generalo Frédéric Lemoine kaj majoro Jacques Rivière. La verko ebligas plaĉe prezenti kaj pripaŝoli la Lingvon Internacian al vastaj popol-tavoloj: ĝi estas vendata interalie en stacidomaj kioskoj. Kiel paĝopiede notas la aŭtoro: «Kompreneble ĉiuj elementoj koncernaj al Esperanto estas rigore ekzaktaj». Kaj certe la Lingvo ne povis trovi pli bonajn advokatajn nimfojn ol la heroinojn: Mireille Wolf, tridekjara, estas «rava blondulino kun malvaj okuloj, kuspa nazo... ŝi estas maldika kaj fleksebla kiel liano»; Elvire de Saint-Preux, «pli konata sub la kromnomo, la Grafino, estas dudeksep-printempa... Ŝiaj kaŝtanaj haroj ekhavas sub la suno felkolorajn rebrilojn. Ŝia treege mallonga ŝorto malvualas belegajn oritajn krurojn».

Unuvorte, agrabla historio, jen imitinda maniero diskonigi en naciaj lingvoj la ekziston kaj vivantecon de la Lingvo Internacia. «—Kaj tio estu!» kiel ĉefine aprobas Elvire, la Grafino, sur la paĝo 221.

Jean Thierry

FERVOJA LEKSIKONO, André Blondeaux.
Ofsete presita, formato 21,5 × 15 cm.,
165 paĝoj, eldono de Franca Fervojista
Esperanto-Asocio. Prezo: 20 FF. plus 5
FF. por sendokostoj.

La Leksikono Franca-Esperanta kun in-
dekso en Esperanto, konsistas el 5.200 ter-
minoj, el kiuj 4.500 estas troveblaj en la
seslingva «Lexique General des Termes
Ferroviaires» (eldono 1975) de Unio Inter-
nacia de la Fervojoj (U.I.C.); la aliaj 700
estas ĉerpitaj el diversaj fontoj. Inter ĉi

lastaj, diversaj listoj, kiujn oni trovas en
manlibroj.

La verko estas dividita jene:

— Unua parto: franca-esperanta vortaro
(106 paĝoj).

— Dua parto: indekso en Esperanto (48
paĝoj).

— Tria parto: diversaj (11 paĝoj).

La libro estas mendebla ĉe Franca Fer-
vojista Esperanto-Asocio, Rue d' Athènes
n.º 1 bis, F-75009 PARIS, aŭ ĉe via Libro-
servo.

V - a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Okazonta en Ateno, Grekujo, de la 8-a ĝis la 15-a de septembro 1979

Korespondadreso:

S-ino Adda Sakellaropoulou

Sokratous 48, Ominia, ATHENO (101)

Grekujo

Konferencejo:

Universitata Domo de la Nacia Organizo

Reĝo Paulo

ĈEFTEMO DE LA KONFERENCO

«Instruado de la Internacia Lingvo Esperanto (lerneja kaj eksterlerneja) kun aparta konsidero al la situacio en Eŭropo.»

La ĉeftemo estos pritraktita en formo de prelegoj kun postaj diskutoj. Estas antaŭ-
viditaj 4 - 5 prelegoj de kompetentaj specialistoj.

Aldone al la ĉeftemo, la Konferenco pritraktos nombron da aktualaj demandoj de la
Neŭtrala Esperanto-Movado.

Dum la Konferenco okazos ankaŭ kunveno de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj
kaj ev. de aliaj fakaj organizoj.

La Organiza Komitato preparas aron da interesaj kulturaj aranĝoj, ekskursoj kaj
distraĵoj.

A T E N T U

La Kongresaj kotizoj, kiuj aperas sur la aliĝiloj, validas por jenaj periodoj:

	Gis 30/6, 1979	Gis 20/8, 1979
Konferencan(in)o	600 dr.	750 dr.
Geedza paro	900 dr.	1000 dr.
Junul(in)o 15-25-jara	400 dr.	500 dr.
Junul(in)o malpli ol 15-jara	senpage	senpage

Al aliĝintoj, kiuj ne partoprenos la Konferencon, estos senditaj la dokumentoj.

Frua aliĝo al la Konferenco estos grava helpo por la Organiza Komitato.

LA PLEJ OBJEKTIVAJ ANALIZOJ EN LA PLEJ KONSCIENCOSKUA
VERKO DE LA NUNTEMPA ESPERANTO-MOVADO:

Ivo Lapenna

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO

Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Politika Konspiro en UEA

DUA KOMPLETIGITA ELDONO

Kopenhago, 1977

Presita, sama formato kiel *Retoriko, Esperanto en Perspektivo* k.a. verkoj de Ivo Lapenna.
152 paĝoj

Prezo 45 danaj kronoj, 5 anglaj pundoj, 18 germ. markoj, 54 fr. fr. 650 pesetoj aŭ egalvaloro plus 10 % por la sendokostoj.

Unuopaj ekzempleroj mendeblaj ĉe la Eldonejo, Nørregardsvej 91, DK-2610 Rødovre Danlando; S-ro H. Müller, Mommsenstr. 5/I, Hannover, Germanio; S-ro Jean Thierry, 5, Rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio; F-ino I. Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º, Zaragoza, Hispanio; la aŭtoro aŭ ĉe bonaj libroservoj.

Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe la Eldonejo, Kopenhago, kun jenaj rabatoj: 33 % ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj, plus 10 % por sendokostoj; 33 % sen sendokostoj ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO koresistas el Antaŭparoloj al la Unua kaj Dua Eldonoj, la tuta teksto de la unua eldono, naŭ gravaj aldonoj, tri pliaj lastmomentaj dokumentoj, Manifesto 77 kaj Indekso Persona. Laŭ la amplekso ĝi estas multe pli granda (je ĉ. du trionoj) ol la unua eldono. *Ciu leginto de la unua eldono devus havigi al si la duan, konsiderinde kompletigitan.*

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO estas bele presita kun eleganta kovrilo, koncizaj informoj pri la aŭtoro kaj lia ĉefa verkaro en diversaj lingvoj. *Ciu posedanto de Retoriko, Aktualaj Problemoj, Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj certe legos kun streĉa intereso la novan libron, verkitan en la konate brila stilo de la aŭtoro, kaj riĉigos siajn sciojn. La monumenta ESPERANTO EN PERSPEKTIVO nur en ligo kun HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO donas kompletan kaj objektivan bildon pri la atingoj de la Internacia Lingvo, pri ĝiaj realaj perspektivoj por la estonteco kaj pri la nuna stato de la Esperanto-Movado, kiu malrapidigas aŭ, eble, eĉ haltigos por ĉiam la realigon de la perspektivoj. Ciu posedanto de ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (ĉefverkinto kaj ĉefredaktoro I. Lapenna) estos plene informita sole per havigo kaj legado de HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO.*

MENDU TUI KAJ ATENTIGU VIAIN GEAMIKOJN

Aliaj verkoj de Ivo Lapenna

Retoriko, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5.300 ekzempleroj disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 6,50 anglaj pundoj, 65 D Kr. aŭ egalvaloro.

Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj, komplemento de *Retoriko*, 152 p., fortike broŝurita, prezo 3,50 angl. pundoj, 35 D Kr. aŭ egalvaloro.

Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo, popularscienca kaj interesa por ĉiu klera persono, 144 p., broŝurita, prezo 2,50 angl. pundoj, 25 DKr. aŭ egalvaloro.

Esperanto en Perspektivo (ĉefaŭtoro kaj ĉefredaktoro), reklamata de UEA kiel «enciklopedio de la nuna tempo», tamen ne kompleta sen *Hamburgo en Retrospektivo*, bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indeksoj, prezo 84 ned. gld. aŭ 212,50 DKr.

Ciuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 × 14 cm.

La verkoj de Ivo Lapenna estas unueca tuto reflektanta la humanecan internaciismon de la aŭtoro kaj lian senfinan sindediĉon al la afero de la Internacia Lingvo.

Mendu tuj ĉe nia Libroservo-Kopenhago, Nørregardsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando. Kun la escepto de *Esperanto en Perspektivo*, la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la aŭtoro, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj Bv. ĉiam aldoni 10 % por la sendokostoj.